

V-19034 / 1971



EL POPOLA ĈINIO

人民中國新道

8

1971

**Vortoj de
Prezidanto Maŭ**

**Unuiĝu por faligi
imperiismon kaj
ĉiujn reakciulojn.**

Prezidanto Maŭ Zedong kun Kamarado Ceausescu Partia kaj Regista



Kamarado Maŭ Zedong intime manpremas kun kamarado Ceausescu.

Intime Intervidiĝas scu kaj la Rumana ra Delegacio



La 3-an de junio, kamarado Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj lia intima kunbatalanto Lin Biao, vicprezidanto de CK de KPC, intervidiĝis kun kamarado Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, kaj lia edzino kamaradino Elena Ceausescu kaj ĉiuj membroj de la rumana partia kaj registara delegacio, kiun li gvidis.

La intervidiĝo iris en tre intima atmosfero plena de amika sentimento de batala unuiĝo inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio. Kiam kamarado Ceausescu kaj lia edzino, kamaradoj Maurer, Manescu, Popa, Iliescu, Macovescu, Duma k. a. honorindaj rumanaĵoj venis en la salonon por intervidiĝo, Prezidanto Maŭ Zedong,

Vicprezidanto Lin Biao, Jongŝeng, Jaŭ Venĵi manpremis kun ili

Prezidanto Maŭ Zedong, kamaradoj, aperiismon kaj ĉiujn salutis vin en la non lando."


Poste Prezidanto Ĝou Enlaj, Kang Ŝesescu kaj lia edzino partia kaj registara



Biaŭ kaj kamaradoj Ĝou Enlaj, Kang Ŝeng, Huang an kaj Li Hiannian varme bonvenigis ilin kaj intime inu post alia.

Zedong ĝoje diris al la rumanaj kamaradoj: "Bonan ankoraŭ pli bonajn tagojn al vi! Unuiĝu por fali ĉi im-akciulojn." Kamarado Ceausescu diris: "Mi varme o de la Rumana Komunista Partio kaj la popolo de nia

o Maŭ Zedong, Vicprezidanto Lin Biaŭ, kamaradoj ng k. a. faris amikan interparolon kun kamarado Ceau- kaj kamarado Maurer kaj aliaj membroj de la rumana delegacio.



Kamarado Lin Biaŭ intime manpremas kun kamarado Ceausescu.



Kamarado Maŭ Zedong intime manpremas kun kamarado Maurer.



Prezidanto Maŭ Zedong kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj kamaradoj Ĝo kun kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj kamarado Maurer kaj aliaj





Kamarado Ceausescu intime interparolas kun kamaradoj Ĝou Enlaj kaj Kang Ŝeng.

Ĝou Enlaj, Kang Ŝeng kaj aliaj ĉinaj kamaradoj intervidiĝas kun kamaradoj de la rumana partia kaj registara delegacio.





Dong Bivu, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicprez
Komitato de PB de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilanta
lia edzino, Maurer, membro de la Plenuma Komitato kaj de la Konsta
troj de la Rumana Socialisma Respubliko, kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj
farita dum la intervidiĝo.



Prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, Ĝou Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Respubliko, kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio intervidiĝis je la 1-a de junio en Bukareŝto kun la Prezidanto de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, Gheorghe Gheorghiu-Dej, Prezidantaro de CK de RKP kaj prezidanto de la Konsilantaro de Ministraro de Rumanio kaj aliaj honorindaj rumanaj gastoj. La foto estas de la ĉina ambasado en Bukareŝto.

La Partia kaj Registara Delegacio de Rumanio Estrata de Kamarado Nicolae Ceausescu Vizitis Ĉinion

LA Partia kaj Registara Delegacio de la Rumana Socialisma Respubliko estrata de kamarado Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Rumanio, alvenis al Pekino posttagmeze de la 1-a de junio, por fari oficialan amikan viziton al nia lando, laŭ la invito de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko.


Kune kun la delegacio venis al Pekino per la sama aviadilo por vizito ankaŭ Elena Ceausescu, edzino de kamarado Ceausescu.

La membroj de la delegacio estas: Ion Gheorghe Maurer, membro de la Plenuma Komitato kaj la Konstanta Prezidentaro de la Centra Komitato de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Rumana Socialisma Respubliko; Manea Manescu, membro de PK kaj KP kaj sekretario de CK

de RKP kaj vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro; Dumitru Popa, membro de PK de CK de RKP, unua sekretario de la Bukaresta Urba Komitato de RKP kaj prezidanto de la Popola Komitato de Bukaresto; Ion Iliescu, alterna membro de PK kaj sekretario de CK de RKP; George Macovescu, membro de CK de RKP kaj unua vicministro de eksteraj aferoj de la Rumana Socialisma Respubliko; kaj Aurel Duma, membro de CK de RKP kaj rumana ambasadoro al Ĉinio.

La honorindajn rumanajn gastojn varme bonvenigis sur la aerodromo Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj aliaj gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj ŝtato.

Kamaradino Giang King, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ, bonvenigis la honorindajn gastojn ĉe la gasta domo.



Kamaradino Giang King, membro de PB de CK de KPĈ, bonvenigis la honorindajn rumanajn gastojn ĉe la gastodomo. La foto estis prenita post la renkontiĝo.

La delegacion bonvenigis sur la aerodromo ĉinaj partiaj kaj ŝtataj gvidantaj kamaradoj Huang Jongŝeng, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo; Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Jaŭ Venjuan, membroj de PB de CK de KPĈ; Li Hiannian, membro de PB de CK de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; Je Gianjing, membro de PB de CK de KPĈ kaj vicprezidanto de la Milita Komisiono sub la Centra Komitato de KPĈ; Je Kjun, membro de PB de CK de KPĈ; Vu Fahian, Li Zuopeng kaj Kiu Hujzuo, membroj de PB de CK de KPĈ kaj vicestroj de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA; Gi Dengkuj, alterna membro de PB de CK de KPĈ; Li Deŝeng, alterna membro de PB de CK de KPĈ kaj estro de la Ĝenerala Politika Departamento de ĈPLA; kaj Guo Moĵuo, membro de CK de KPĈ kaj vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj; kaj Vu De, membro de CK de

KPĈ, dua sekretario de la Pekina Urba Komitato de KPĈ kaj vicestro de la Pekina Urba Revolucia Komitato; kaj aliaj.

Posttagmeze de la 1-a de junio, centoj da miloj da revoluciaj popolanoj de nia ĉefurbo ĝoje kolektiĝis sur la aerodromo kaj laŭlonge de ĉefaj stratoj de la urbo por varme kaj solene bonvenigi la honorindajn rumanajn gastojn kaj esprimi la profundan amikecon de la ĉina popolo al la rumana popolo, ĝian firman subtenon al la justa batalo de la rumana popolo por defendi la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon kaj oponi kontraŭ fremdlanda interveno, kaj ĝian firman subtenon al la rumana popolo konstrui socialismon sendepende kaj sinapogante sur propraj fortoj. La ĉina popolo aklamas la amikan viziton de kamarado Ceausescu, kamarado Maurer kaj la aliaj honorindaj rumanaj gastoj al Ĉinio, kaj kredas, ke la vizito certe plifirmigos kaj disvolvos la batalan amikecon kaj




revolucion unuiĝon inter la partioj kaj popoloj de Ĉinio kaj Rumanio.

Je 30 minutoj post la 3-a posttagmeze, kamarado Ceausescu, kamarado Maurer kaj aliaj honorindaj gastoj descendis de la aviadilo en ĝojkrioj. Kamaradoj Ĝoŭ En-laj, Huang Jongŝeng, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj aliaj iris renkonte al ili kaj varme manpremis kaj brakumis kun ili. Ili interŝanĝis korajn salutojn.

Solena bonveniga ceremonio okazis sur la ĉefurba aerodromo, super kiu fliris la naciaj flagoj de Ĉinio kaj Rumanio.

Poste, kamarado Ceausescu kaj lia edzino, akompanate de kamarado Ĝoŭ En-laj, kaj kamarado Maurer, akompanate de kamaradoj Huang Jongŝeng kaj Ĝang Ĉun-

CK de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio aranĝis grandiozan festenon por varme honori la rumanan partian kaj registaran delegacion en la 1-a de junio. La foto montras la gastojn kaj gastigantojn elirantajn el la salono.



kiaŭ, ricevis en senkovrilaj aŭtoj varman bonvenigon de la amasoj ambaŭflanke de la stratoj.

La pli ol 20 liojn longa vojo kondukanta al la gasta domo estis ornamita per flirtantaj ruĝaj flagoj kaj gigantaj portretoj de kamarado Ceausescu staris ĉe ĉefaj kruciĝoj.

La aŭtoj de la honorindaj gastoj trapasis amikecan koridoron formitan de entuziasmaj amasoj svingantaj florojn kaj flagojn kaj atingis Tian-anmen-placon, kie tuj aperis plej kortuŝa sceno de bonvenigo. Ĝojkrioj kaj sonado de tamburoj kaj tamtamoj skuis la placon kaj miloj da koloraj balonoj flugis supren. Pli ol 4,000 homoj sur la revuaj altanoj formis per levataj bukedoj la vorton "bonvenon" en la ĉina kaj rumana lingvoj. Infanoj svingis florojn kaj kolorajn rubandojn kaj dancis laŭ ĝojaj melodioj. Pli ol 10,000 artistoj prezentis la Ruĝsilkan Dancon, la Dancon de Riĉa Rikolto kaj la Dancon de Unuiĝo de Ĉiuj Nacioj. Ĝojo ŝaŭmis el la kantantaj kaj dancantaj amasoj sur la placo. Kamarado Ceausescu kaj lia edzino, kamarado Maurer kaj la aliaj honorindaj rumanaj gastoj varme mansvingadis al la bonvenigantaj amasoj.

Tiuvespere, la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko donis grandan festenon por varme bonvenigi la rumanan partian kaj registaran delegacion estratan de kamarado Nicolae Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro.

Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj sinjorino Sihanuk vizitantaj Tiangin, revenis speciale al Pekino por ĉeesti la festenon.

La granda festeno okazis en la Bankeda Salono de la Popola Halo. La naciaj

flagoj de Rumanio kaj Ĉinio pendis flanko ĉe flanko en la salono. Kiam kamarado Ceausescu kaj lia edzino, kamarado Maurer kaj aliaj honorindaj rumanaj gastoj eniris la salonon akompanate de kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Huang Jongŝeng, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj aliaj, varma aplaŭdo leviĝis kun muziko honore al la amikaj senditoj de la rumana popolo.

Ĉe la festeno, kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Ceausescu faris paroladojn por laŭdi la amikecon inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio.



En sia parolado, kamarado Ĝou Enlaj esprimis, en la nomo de Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto Viceprezidanto Lin Biaŭ, en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo, varman bonvenigon al la honorindaj rumanaj gastoj. Li diris: La vizito de la partia kaj registara delegacio estrata de kamarado Ceausescu al nia lando alportas al ni profundan amikecon de la rumana popolo. Tio ĉi estas subteno kaj kuraĝigo al la ĉina popolo. La rumanaj kamaradoj bonvolu kredi, ke la ĉina po-

polo hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio ĉiam staros ŝultro ĉe ŝultro kun vi kaj firme subtenos vin en via batalo por defendi kaj konstrui vian patrolandon. Ni kredas, ke la amika vizito de la rumana partia kaj registara delegacio al nia lando certe faros valoregan kontribuon al pliapaŝa fortigo de la batala amikeco kaj revolucia unuiĝo inter niaj du partioj, du landoj kaj du popoloj.

En sia parolado kamarado Ceausescu diris: Mi tre ĝoje transdonas la varmajn

Partiaj kaj ŝtataj gvidantaj kamaradoj de Ĉinio kaj Rumanio faras interparoladon en tre intima atmosfero.



kaj kamaradajn salutojn de la Centra Komitato de la Rumana Komunista Partio, la membroj de la Rumana Komunista Partio kaj la tuta laboranta popolo de nia lando al la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, al kamarado Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto kamarado Lin Biaŭ, al nia amiko Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj al la membroj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la tuta ĉina popolo.

Kamarado Ceausescu daŭrigis: La potenco kaj firmeco de niaj rilatoj devenas de la fakto, ke ili estas bazitaj sur la neŝancebla fundamento de la principoj de Marksismo-Leninismo kaj socialisma internaciismo, de la respekto al nacia sendependeco kaj ŝtata suvereneco, neinterveno al internaj aferoj, egalrajteco kaj kamaradeca interhelpo. Ni konvinkiĝis ke la vizito de la rumana delegacio al via lando akcelos la disvolviĝon de la interrilatoj de amikeco, kunlaboro kaj frata unuiĝo inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Rumanio kaj Ĉinio. En la batalo kontraŭ imperiismo kaj por la venko de la afero de paco kaj socialismo en la tuta mondo, la Rumana Socialisma Respubliko kaj la Ĉina Popola

Respubliko subtenos unu la alian kaj komune agados.

Post la paroladoj de kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Ceausescu, orkestro ludis la naciajn himnojn de Rumanio kaj Ĉinio. Iliaj paroladoj vekis foje kaj refoje varmajn aplaŭdojn en la tuta salono.

Posttagmeze de la 2-a de junio, la gvidantoj de la du partioj kaj du registaroj de Ĉinio kaj Rumanio faris interparoladon.

La interparolado iris en tre intima atmosfero.

Tiutage, kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj la rumana partia kaj registara delegacio sub lia gvido vizitis Kinghua-universitaton akompanate de kamarado Huang Jongŝeng kaj aliaj.

En 1964, kamarado Ceausescu vizitis Kinghua-universitaton. Ĉifoje, kiam li ĝin vizitis denove, ĉiuj instruistoj, oficistoj kaj laboristoj, laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la universitato sentis grandan ĝojon.

La partia komitato kaj revolucia komitato de la universitato rakontis al kamarado

Dum sia vizito al Nankino, la rumana partia kaj registara delegacio rigardis artan prezentadon de la Propaganda Trupo pri Maŭzedongpenso de Nankinaj Ruĝaj Gvardianoj kaj fotiĝis kun ili.





La rumana partia kaj registara delegacio venas al Ŝanhajo por fari viziton kaj estas varme bonvenigata de centmiloj da revoluciaj popoloj.

Ceausescu kaj aliaj honorindaj rumanaj gastoj la profundan ŝanĝigon de Kinghua-universitato okazintan dum la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj la unuapaŝajn fruktojn akiritajn en la eduka revolucio.

Poste, kamarado Ceausescu kaj la aliaj rigardis la aŭtofabrikon, ilmaŝinan fabrikon, elektronan sintezan eksperimentan fabrikon kaj la polikarbonatan laborejon funkciigatajn de la universitato. Kiam ili rigardis ilmaŝinon kies procedado estas regata per komputilo, manipulanto de tiu maŝino donacis al kamarado Ceausescu produktajn el poliakrilato kun la vortoj "Vivu la amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj!", engravurita per tiu ilmaŝino. Kiam la rumanaj kamaradoj rigardis komputilon

projektitan kaj faritan de instruistoj, laboristoj kaj studentoj, la maŝino aŭdigis la rumanan kanton *Bela Rumanio*.

Post la rigardado, kamarado Ceausescu faris varman kaj amikan paroladon al la instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de la universitato. Li diris: Hodiaŭ mi tre ĝojas vidi vian universitaton. El viaj atingoj oni povas vidi, ke vi estas strebantaj por kombini edukadon kun produkta praktiko, por intimigi la interligon de la studentoj kun laboristoj, kamparanoj kaj la tuta popolo, tiel ke ili povu pli bone servi al socialismo kaj la popolo.

Kamarado Ceausescu transdonis salutojn de la instruistoj kaj studentoj de la

Bukaresta Universitato de la rumana ĉefurbo. Li esprimis sian bondeziron, ke la instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-universitato akiru ankoraŭ pli grandajn sukcesojn.

Antaŭtagmeze de la 3-a de junio, kamarado Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj lia intima kunbatalanto kamarado Lin Biaŭ, vicprezidanto de CK de KPĈ, intervidiĝis kun kamarado Ceausescu, ĝenerala sekretario de la Rumana Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, kaj lia edzino kamaradino Elena Ceausescu kaj ĉiuj membroj de la rumana partia kaj registara delegacio.

Posttagmeze de la 3-a de junio, partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio kaj Rumanio daŭrigis sian interparoladon.

Vespere, akompanate de Ĝoŭ Enlaj, Giang King, Huang Jongŝeng, Jaŭ Venjuan, Je Kjun, Kiu Hujzuo, Guo Mojuo kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantaj kamaradoj, kamarado Ceausescu kaj lia edzino Elena Ceausescu, Maurer kaj aliaj kamaradoj rigardis la revolucion modernan baledon *Ruĝa Virina Taĉmento* luditan de la Ĉina Baleda Trupo. La prezentado ricevis varman aplaŭdon de la honorindaj rumanaj gastoj.

De la 5-a ĝis la 7-a de junio, sub akompanado de kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĝang Ĉu kaj aliaj, kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaj kamaradoj vizitis Nankinon kaj Ŝanhajon. La honorindaj rumanaj gastoj ricevis varman bonvenigon de centmiloj da revolucionaj popolanoj ĉe ambaŭ flankoj de la trairataj vojoj.

Kamarado Hju Ŝijoŭ, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, unua sekretario de la Provinca Komitato de Giangsu de KPĈ, estro de la Revolucia Komitato de Giangsu-provinco kaj ĉefkomandanto de la Nankina Milita Regiono de ĈPLA, donis

festenon por bonvenigi la rumanajn kamaradojn kaj akompanis ilin rigardi la Nankinan Pontegon super Jangzi-rivero, artan prezentadon de ruĝaj gvardianetoj kaj militan ekzercadon de milicanoj, ruĝaj gvardianoj kaj ruĝaj gvardianetoj.

Dum sia vizitado al Ŝanhajo, kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaj kamaradoj vizitis la Industriian Ekspozicion de Ŝanhajo, rigardis la revolucion modernan baledon *Blankhara Knabino* luditan de la Ŝanhaja Danco-lernejo kaj vizitis Giangnan-ŝipkonstruejon kaj Malu-popolkomunumon de Giading-gubernio en antaŭurbo de Ŝanhajo kaj ricevis varman bonvenigon de laboristoj kaj komunumanoj.

Posttagmeze de la 8-a, dekmilo da revolucionaj popolanoj de Pekino okazigis solenan mitingon en la Popola Halo por varme bonvenigi la rumanan partian kaj registaran delegacion estratan de kamarado Ceausescu je ĝia amika vizito al Ĉinio. En la mitingo kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj kamarado Ceausescu faris paroladon unu post la alia. Iliaj paroladoj ricevis senĉesajn varmajn aplaŭdojn de la ĉeestantoj.

La mitingo donacis al la rumana partia kaj registara delegacio broditan flagon kun jena surskribo: "Vivu la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Rumanio!" Kamarado Ceausescu donacis al la laboranta popolo de nia ĉefurbo broditan flagon kun jena surskribo: "Vivu la batala amikeco inter la popoloj de Rumanio kaj Ĉinio!"

Vespere, kamarado Ceausescu donis grandan festenon por danki la Centran Komitaton de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtatan Konsilantaron de la Ĉina Popola Respubliko.

La 9-an de junio, publikiĝis la Komuna Komunikado de Ĉinio kaj Rumanio. La komunikado diris: "La du flankoj montras kun kontento, ke en lastaj jaroj la rilatoj inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio multe disvolviĝis. La



La rumana partia kaj registara delegacio sur la aerodromo de Pekino antaŭ ekflugo al la Demokratia Popola Respubliko de Koreio por fari amikan viziton.

gvidantoj de la du landoj multigis siajn kontaktojn kaj profundigis sian interkomprenon. La kunlaboro inter la du landoj en politiko, ekonomio, kulturo kaj aliaj kampoj plifortigis kaj plivastigis rimarkinde. La amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Rumanio estas bazitaj sur Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo kaj estas strikte konformaj al la principoj de tuta egaleco, sendependeco, reciproka respekto kaj reciproka neinterveno en internaj aferoj; ili povas elteni provojn. La disvolviĝo de la amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter Ĉinio kaj Rumanio favoras al la revolucia afero de la du popoloj kaj la popoloj de la mondo. Ambaŭ flankoj unuanime esprimas sian decidemon ankoraŭ pli fortigi la revolucian amikecon kaj batalan unuiĝon inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj kaj plivastigi sian kunlaboron en diversaj kampoj.

“La rumana flanko prenas tiun ĉi ŝancon por esprimi varmajn dankojn de la rumana

popolo al la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko pro ilia kamaradeca kaj amikeca subteno en la formo de valora materia helpo senpaga al Rumanio, kiam la lasta suferis naturan katastrofon en la printempo de 1970.

“La ĉina flanko esprimas sincerajn dankojn al la Rumana Komunista Partio, la Registaro de la Rumana Socialisma Respubliko kaj la rumana popolo pro ilia subteno kaj helpo al la revolucia batalo kaj afero de socialisma konstruado de la ĉina popolo.”

Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj la Partia kaj Registara Delegacio de la Rumana Socialisma Respubliko sub lia gvido sukcese finis sian oficialan amikan viziton al nia lando kaj forlasis Pekinon per speciala aviadilo antaŭtagmeze de la 9-a, kun profunda amikeco de la ĉina popolo al la frata rumana popolo, por veturi al la Demokratia Popola Respubliko de Koreio por fari amikan viziton.



Ĉiam Flirtos la Ruĝa Flago de Ginggaŝ-montaro

SUR la impona Ginggaŝ-montaro ĉiam verdas pinoj kaj bambuoj.

En oktobro de 1927, la granda gvidanto de la ĉina popolo kamarado Maŭ Zedong venis en la montaron kun la revolucia armeo de laboristoj kaj kamparanoj sub sia gvido, kaj kreis tie la unuan kamparan revolucian bazon de nia lando. Kamarado Maŭ Zedong propramane malfermis la vojon de Ginggaŝ-montaro, t.e. sub la gvido de la proletara partio mobilizi kamparanajn amasojn por konduki gerilan militon, disvolvi agraran revolucion, starigi bazojn en la kamparo, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine kapti la urbojn. Tio estas la vojo de kaptado de la regpotenco per armitaj fortoj.

La revolucia Ginggaŝ-montaro estas la meza parto de Luohiaŭ-montĉeno ĉe la limo inter la provincoj Gianghi kaj Hunan kaj vastas 550 liojn ĉirkaŭe. Siatempe, la reakcia reganta forto en tiu loko estis malgranda, kaj krome tiu loko kun altaj montoj, densaj arbaroj kaj kvin pasejoj, nome Tongmuling en la oriento, Ĝuŝaĉong en la sudo, Ŝuangmaŝi en la okcidento, Huangjanggie en la nordo kaj Bamianŝan en la nordokcidento, estas tre oportuna por disvolvi kaj fortigi revoluciajn trupojn kaj por fari atakon aŭ defendon. La bazo de Ginggaŝ-montaro estas loko por kolektiĝo, stariĝo kaj komenco de agado por la revoluciaj fortoj de Ĉinio.

LA NEPRE SEKVENDA VOJO DE LA ĈINA REVOLUCIO

La marŝo de la revolucia armeo de laboristoj kaj kamparanoj al Ginggaŝ-montaro sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong estas granda turnopunkto de la ĉina revolucio en la strategio.

De pli ol cent jaroj, la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio suferadis de subpremado kaj ekspluato de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Por serĉi revolucian veron por Ĉinio, sennombraj revoluciaj aspirantoj foliumis historiajn verkojn, lernis de antikvuloj, kaj nemalmultaj el ili trairis Okcidentan Eŭropon kaj Nordan Amerikon por lerni de okcidentanoj, sed kun tre malmulta rezulto; la malnova Ĉinio restis senŝanĝa kaj la ĉina popolo baraktis en mizero kaj suferoj.

Kamarado Maŭ Zedong montris: “**La kanona ektondro de la Oktobra Revolucio sendis al ni Marksismen-Leninismen.**” “**La ĉinoj trovis Marksismen-Leninismen, la universalan veron ĉie aplikeblan, kaj eksanĝigis la trajtojn de Ĉinio.**” Post sia fondiĝo en 1921, la Komunista Partio de Ĉinio unuiĝis kun Kuomintango kaj progresemaj fortoj de suda Ĉinio en la Unua Enlanda Revolucia Milito dum la periodo de 1924 ĝis 1927, por batali kontraŭ la nordaj militaristoj subtenataj de imperiistoj. Tiam la revoluciaj fortoj rapide disvastiĝis ĝis la basenoj de Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero, kaj la movado de laboristoj kaj kamparanoj disvolviĝis impete.

La Norden-Ekspedicia Armeo forte batis la reakciajn fortojn de imperiismo kaj feŭdismo, kaj ĝiaj venkoj teruris la en- kaj ekster-landajn reakciulojn. En la 12-a de aprilo, 1927, subtenate de imperiistoj kaj feŭdaj kaj kompradoraj fortoj, Ĉiang Kajŝek, la ĉefo de la kuomintangaj dekstruloj kaj reprezentanto de la grandbienuloj kaj grandburĝoj, perfidis la revolucian aliancon de Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio, lanĉis kontraŭrevolucian ŝtatrenverson kaj arestis kaj buĉis grandnombrajn kompartianojn kaj revoluciajn popolanojn. Tiutempe, la dekstraj oportu-



nistoj kun Ĉen Duhio kiel reprezentanto en la Komunista Partio de Ĉinio oponis kontraŭ la ĝusta linio de kamarado Maŭ Zedong, kapitulacis al Ĉiang Kajŝek, humile transdonis la gvidantecon de la revolucio al la kuomintangaj reakciuloj kaj fordonis al ili la armitajn fortojn de laboristoj kaj kamparanoj kaj ordonis malorganizi la kamparanajn memdefendajn fortojn kaj laboristajn pikedojn. La popolaj fortoj gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio suferis seriozan baton de la reakciaj fortoj de Kuomintango kaj la vigle disvolviĝanta revolucio trafis malvenkon.

La 7-an de aŭgusto, 1927, la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis urĝan kunvenon en Vuhan. En tiu kunveno oni kritikis la eraran linion de Ĉen Duhio. Laŭ la marksisma-leninisma principo de perforta revolucio kaj la historia leciono de la ĉina revolucio, kamarado Maŭ Zedong alvokis la tutan partion kaj tutlandan popolon ekpreni armilojn por fari perfortan revolucion, antaŭenpuŝi la agraran revolucion per armita batalo kaj kapti ŝtatpotencon per pafiloj. Por disvolvi kaj grandigi la revoluciajn fortojn de laboristoj kaj kamparanoj, firmigi ilian aliancon, kamarado Maŭ Zedong disvolvis movadon de laboristoj kaj kamparanoj en Hunan, Kantono, Ŝanhajo kaj aliaj, kaj persone organizis kaj gvidis revoluciajn armitajn batalojn, tiel ke la revoluciaj fortoj denove grandiĝis iom post iom.

En la 8-a de septembro, 1927, eksplodis la Aŭtunrikolta Leviĝo sub personaj iniciato kaj gvidado de kamarado Maŭ Zedong. Samtempe kun tio, ankaŭ eksonis pafoj de armitaj ribeloj de laboristoj en Hunan kaj Gianghi. Indignaj krioj de la revolucia popolo skuadis la teron: “Ribelu! For

Kuomintangon!” “Ribelu! For la lokajn tiranojn kaj malbonajn biensinjorojn!” “Ribelu! Reprenu perforte la teron por la kamparanoj!” En Ĉinio ekbrulis fajreroj de perforta revolucio.

La trupoj de la Aŭtunrikolta Leviĝo venke kuniĝis en Vengiaŝi de Liujang, Hunan-provinco kaj poste marŝis suden laŭ la limo inter Hunan kaj Gianghi, trarompis la baradon de kuomintangaj reakciuloj kaj starigis sian revolucionan ruĝan flagon sur Ginggang-montaron. Ekde tiam, la majesta Ginggang-montaro fariĝis la unua kampara revolucia bazo de Ĉinio.

LA NASKIĜO DE LA UNUA NOVTIPA POPOLA ARMEO

*Al Sanvan venas nia komandanto Maŭ,
Kun la armeo laborista-kamparana;
La ruĝa flago flirtas ĉie en Sanvan,
Revolucio brulas en Val' Giulongŝan-a.*

Tiu ĉi popolkanto tiutempe cirkulis inter la popolanoj de Ginggang-montaro por prikanti la revolucionan armeon de laboristoj kaj kamparanoj sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong. Alveninte al la vilaĝo Sanvan de Jonghin-gubernio en la regiono de Ginggang-montaro, la revolucia armeo faris tie al si la “reorganizon en Sanvan” kun granda historia signifo. Tiutempe en la trupoj ne estis perfekta partia organizo. Kamarado Maŭ Zedong persone starigis partiajn organizojn en ili, tiel ke ĉiu subplotono havis partian grupon, ĉiu roto havis partian filion, ĉiu bataliono kaj regimento havis partian komitaton; en la unuoj super la nivelo de roto instaligis partia reprezentanto kaj la tuta armeo sin metis sub la



La ĝenerala partia filio de Sanvan-brigado daŭrigas kaj disvolvas la revolucionan tradicion de la partia filio de Sanvan persone fondita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ĝi estas elektita kiel provinca avangarda kolektivo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Gianghi.

unuecan gvidadon de la Fronta Partia Komitato. Tiamaniere, la armeo fariĝis tute novtipa popola armeo sub la absoluta gvido de la proletara partio.

En aprilo de 1928, parto de la trupoj, kiuj ribelis je la 1-a de aŭgusto en Nanĉang, venis al Gínggang-montaro sub la gvido de kamarado Ĝu De kaj kamarado Lin Biaŭ, la intima kunbatalanto de kamarado Maŭ Zedong, kaj venke kuniĝis kun la trupoj gvidataj de kamarado Maŭ Zedong partoprenintaj la Aŭtunrikoltan Leviĝon kaj organiziĝis en la Ĉinan Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon.

Kiam la Ruĝa Armeo disvolviĝis laŭ la armeo-konstrua linio montrita de kamarado Maŭ Zedong, granda karieristo Peng Dehuaj kaj similaj, sinkaŝintaj en la revoluciaj trupoj, publike pledis por meti la organizojn de politika laboro en la Ruĝa Armeo sub la organizojn de militaj aferoj kaj elmetis la sloganon “armeaj stabo traktu ekster-armeajn aferojn” kaj oponis kontraŭ tio, ke “la Partio komandu la pafilon”. Kamarado Maŭ Zedong akre montris: “Se tiu ideo estas permesata disvolviĝi plu, do estiĝos la danĝero apartiĝi de la

amasoj, kontroli la politikan potencon per la armeo kaj devii de proletara gvido — tio signifas suriri tian vojon de militarismo, kian iras la kuomintanga armeo.” La Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo firme efektivigis la ĝustan linion de kamarado Maŭ Zedong en konstruado de la armeo, plifortigis sian koncepton pri la gvido de la Partio kaj fariĝis armita kolektivo por plenumi revoluciajn politikajn taskojn sub la gvido de la Partio. Krome kamarado Maŭ Zedong elmetis tutan kompletan da teorio, principo kaj orientilo por konstruado de armeo sur politika bazo, ellaboris tri fundamentajn principojn en politika laboro de la popola armeo, nome “**unuco inter oficiroj kaj soldatoj**”, “**unuco inter la armeo kaj la popolo**” kaj “**malkomponado de la malamika armeo kaj malsevera traktado de militkaptitoj**”, difinis tri taskojn por la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo “**batali por ekstermi la malamikojn, deproprigi lokajn tiranojn por akiri monrimedon, propagandi al la amasoj, organizi ilin, armi ilin kaj helpi ilin en starigo de revolucia regpotenco**”, proklamis “**Tri Ĉefajn Regulojn de Disciplino kaj Ses Punktojn de Atentigo**” de la popola armeo kaj efektivigis tutan sistemon

de demokratio sub la direkto de centralizo kaj ĝenerale starigis soldatan komitaton en la rotoj, batalionoj kaj regimentoj. Dank' al tio tute noviĝis la fizionomio de la Ruĝa Armeo, kaj la revolucia spirito de brava antaŭenpuŝiĝo plenigis la armeon.

MOBILIZI KAMPARANAJN AMASOJN POR GERILADO


Dum la kreado de la revolucia bazo de Gingga-montaro, kamarado Maŭ Zedong spertis multajn malfacilojn, plurfoje forigis la malhelpojn de "maldekstra" kaj dekstra oportunismo, senŝanceliĝe gvidis la Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon kaj la popolon de tiu loko en starigo de popola regpotenco, disvolvo de popolaj armitaj fortoj, faro de gerilado, disvolvo de agrara revolucio, disvolvo de agrikultura produkto kaj entrepreno de kultura kaj eduka afero kaj ĉiuj aliaj aferoj necesaj por la sendependa ekzistado de la bazo.

En la komenco, iuj kamaradoj en la Partio ne sufiĉe bone konis la eblecon de mobilizado de la kamparanaj amasoj por fari geriladon. Vidante, ke la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo veninta al Gingga-montaro konsistas el malmultaj homoj kun malbonaj armiloj; kvankam Gingga-montaro estis bonega tereno strategia, tamen ĝi havis malpli ol 2,000 loĝantojn kaj povis produkti malpli ol 1,000,000 ĝinojn da rizo kaj krome la reak-

ciuloj de Kuomintango ofte faris militajn atakojn kaj kruelan ekonomian blokadon, tial ili ne havis sufiĉan memfidon kaj decidemon en starigo de revolucia bazo en Gingga-montaro por fine gajni venkon de la tuta lando kaj elmetis la demandon: "Kiom longe ni povas teni la ruĝan standardon?" En Gingga-montaro, kamarado Maŭ Zedong skribis la brilajn verkojn *La Batalo en Ginggaŝan, Kial Ruĝa Politika Potenco en Ĉinio Povas Ekzisti?* k. a., per kiuj li konkrete direktis la batalon ĉe Gingga-montaro kaj stimulis la revolucion popolon, ke ĝi kuraĝu batali kaj kapti venkon. Krome, kamarado Maŭ Zedong donis bonan ekzemplon al la batalantoj, trairis Gingga-montaron kun pajlĉapelo sur la kapo kaj pajlaj sandaloj sur la piedoj, persone faris enketojn kaj esplorojn, plene sin apogis sur la amasoj kaj ilin mobilizis por vaste disvolvi agraran revolucion, deproprigante lokajn tiranojn kaj dividante teron al la kamparanoj. La liberigitaj kamparanoj de Gingga-montaro starigis unuj post aliaj lokajn armitajn organizojn, nome ruĝajn gvardiojn kaj ribelajn taĉmentojn de laboristoj kaj kamparanoj, kaj fondis revoluciajn amasajn organizojn kiel brankardistajn taĉmentojn, transportajn taĉmentojn, urĝsavajn taĉmentojn, lavistajn taĉmentojn, junpionirajn kaj infanajn grupojn. Ĉie aperis tiaj kortuŝaj scenoj ke patroj sendis siajn filojn kaj edzinoj sendis siajn edzojn al la Ruĝa Armeo por ĝin aliĝi.

La malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ciping, kie li verkis la brillan artikolon La Batalo en Ginggaŝan.





Infanoj de Ginggang-montaro respektplene vizitas la tombejon de revoluciaj martiroj.

Viroj kaj virinoj ĉu junaj aŭ maljunaj iris al batalo kaj la tuta Ginggang-montaro fariĝis firma posteno kun diversaj fortikaĵoj defendata de batalantoj kun forta unueca volo simila al citadelo.

En aŭgusto de 1928, profitante la okazon, ke la ĉefforto de la Ruĝa Armeo foriris de la bazo, la malamikoj en Hunan kaj Gianghi lanĉis atakon al la pasejo Huangjanggie, per armitaj fortoj de 4 regimentoj. Tiam nur malpli ol unu bataliono da homoj gardis la pasejon. La kuomintangaj reakciuloj intencis konkeri la revolucionan bazon kaj estingi la revolucionajn flamojn de Ginggang-montaro per unu bato. Sed la armeo kaj popolo sur ĝi armitaj per la penso de kamarado Maŭ Zedong pri popola milito ĉiuj mobiliziĝis: la ruĝaj gvardioj kaj ribelaj taĉmentoj batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la Ruĝa Armeo, la nearmitaj popolanoj helpis la Ruĝan Armeon en konstruado de fortikaĵoj, farado de bambuaj pikiloj, transportado de ŝtonoj, preparo de rulŝtipoj, transporto de kugloj kaj manĝaĵoj; kaj la junpioniroj kaj membroj de la infana grupo

partoprenis la batalon tenante ruĝajn flagojn por kuraĝigi la batalantojn. Ĉiuj armeanoj kaj popolanoj batalis heroe, venkis 4 sinsekvajn sturmojn de la malamikoj kaj fine la lastaj forfuĝis nokte. Pri tiu venka batalo por defendo de Huangjanggie, kamarado Maŭ Zedong verkis la impone belan poemon “Ginggang-montaro”:

*Sube videblas flagoj densaj, kaj surmonte
Resonas la tambur-trumpeta batalvoko.
La malamikoj nin sieĝas en mil kaj mil vicoj,
Tamen, ni staras ĉiam kiel firma roko.*

*Delonge pretis jam defend-aranĝoj ĉiaj,
La unueca vol’ — remparo plej fortika —
Jen la kanonaj muĝoj ĉe l’Huangjanggie-front’
anoncas*

Dumnoktan fuĝon de la hordo malamika.

En la granda praktiko de la batalado en Ginggang-montaro, kamarado Maŭ Zedong kreive resumis la strategion kaj taktikon de gerila milito, nome: **“Dividu la fortojn por mobilizi la amasojn, koncentru la fortojn por agi kontraŭ la malamiko.”**


“La malamiko almarŝas, ni retiriĝas; la malamiko kampadas, ni ĝenas; la malamiko laciĝas, ni atakas; la malamiko retiriĝas, ni persekutas.” “Por vastigi stabilajn detranĉitajn areojn, ni alprenu la politikon de ondmaniera antaŭenpuŝiĝo. Persekutate de forta malamiko, ni alprenu la politikon de rondirado.” “Mobilizu tre vastajn amasojn en tre mallonga tempo kaj per tre bonaj metodoj.” “Tiaj taktikoj similas al uzado de reto; ni devas esti ĉiam pretaj ĝin etendi aŭ kuntiri, etendi por gajni la amasojn kaj kuntiri por agi kontraŭ la malamiko.” Tio ĉi estas fundamentaj principoj de gerila militado difinitaj surbaze de la fakto, ke la malamiko estas forta dum niaj fortoj estas malgrandaj; la malamiko estas potenca, dum ni estas malpotencaj; la malamiko disiĝas de la popolo, dum ni interligiĝas kun la popolo kaj ni povas ataki la malavantaĝon de la malamiko per nia avantaĝo. Tiuj principoj formis fundamenton por la strategio kaj taktiko aplikitaj en la enlanda revolucia milito kaj Kontraŭjapana Rezistmilito.

SOLA FAJRERO POVAS BRULIGI TUTAN STEPON

La naskiĝo kaj disvolviĝo de la tuta regiono de ruĝa reĝimo de la revolucia bazo de Gianggang-montaro estas brila modelo de kombino de Marksismo-Leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio fare de kamarado Maŭ Zedong.

Per sia granda revolucia praktikado, kamarado Maŭ Zedong kreis la novan situacion de armita sendependa reĝimo de laboristoj kaj kamparanoj en Gianggang-montaro: la areo de la sendependa reĝimo plivastiĝis, la agrara revolucio profundigis, la popola reĝimo disvastiĝis kaj la Ruĝa Armeo kaj ruĝaj gvardioj plipotenciĝis kun ĉiu tago. Samtempe kun la senĉesa firmiĝo kaj vastiĝo de la bazo de Gianggang-montaro, persone gvidate de kamarado Maŭ Zedong, la ĉefforto de la Ruĝa Armeo militiris al suda Gianghi kaj okcidenta Fugian por krei novajn revoluciajn bazojn. Sub la persona komando de kamarado Maŭ Zedong ĝi bataladis en suda Gianghi kaj trifoje marŝis en Fugian-provincon. Post penega batalado en unu jaro, fine ĝi sukcesis starigi la centran revolucionan bazon kun Ĵujgin de Gianghi kiel la centro kaj tiel formis siatempe la grandan revolucionan postenon en politiko, militaj aferoj, ekonomio kaj kulturo. En 1933, la nombro de la soldatoj de la regulaj trupoj de la Ruĝa Armeo atingis 300,000 homojn, kiuj dislokiĝis en Gianghi, Hunan, Hubej, Fugian, Guangdong kaj aliaj pli ol kvin provincoj, kaj fondiĝis pli ol 10 revoluciaj bazoj, kiaj la Centra Soveta Regiono, Hubej-Henan-Anhuj-a Regiono kaj la Okcidenta Limregiono de Hunan kaj Hubej. Sub la gvido kaj komando de kamarado Maŭ Zedong, la Ruĝa Armeo venke frakasis 4 “ĉirkaŭekstermojn” de la reakciuloj de Kuomintango, la revolucia fajrero de Gianggang-montaro brulis tra

Vengiaŝi, kie kuniĝis la diversaj trupoj partoprenintaj la Aŭtunrikoltan Leviĝon. La placo montrata en la foto estas loko, kie Prezidanto Maŭ faris siatempe gravan paroladon al la trupoj.





Milicianoj de la areo de Gínggang-montaro faras militan ekzercon en Longjuankoŭ, kie estis gajnita siatempe la granda venko.

ĉiuj lokoj de la lando, kaj aperis bona revolucia situacio.

La rapidega disvolviĝo de la revolucio tre teruris la reakciulojn de Kuomintango. En oktobro de 1933, la reakciuloj de Kuomintango kolektis milionon da armeanoj kaj lanĉis la 5-an “ĉirkaŭekstermon”. Tiam la Provizora Centra Komitato de la Partio sub la regado de la renegata kliko de Vang Ming translokiĝis de Ŝanhajo al la Centra Revolucia Bazo de Gianghi kaj refoje forpuŝis la ĝustan gvidadon de kamarado Maŭ Zedong, antaŭenpuŝis la “maldekstran” oportunisman linion, elmetis erarajn devizojn kiel “rezistu kontraŭ la malamiko ekster la pordo de la ŝtato”, alprenis la eraran militan linion “fari atakon en la tuta linio” kaj “bati la malamikon per du pugnoj”, neis la bezonon de gerila militado kaj movada militado kun gerila karaktero sub la aktuala kondiĉo, ke la malamiko estas forta dum nia forto estas malgranda. Tio rezultigis la malvenkon de la kvina kontraŭ-“ĉirkaŭekstermo” kaj perdon de ĉirkaŭ 90 procentoj de la revoluciaj fortoj. La Ruĝa Armeo devis retiriĝi el la Centra Revolucia Bazo kaj komenci strategian translokiĝon marŝi norden por rezisti kontraŭ japanaj agresantoj kaj fari Longan Marŝon de 25,000 lioj. En januaro

de 1935, survoje de la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo okupis la urbon Zunji en Gujĝoŭ-provinco. La Centra Komitato de la Partio kunvokis tie plivas-tigitan kunvenon de la Politika Buroo de la Centra Komitato kaj starigis la gvidon de la Centra Komitato de la Partio kun kamarado Maŭ Zedong kiel la estro. De tiam sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina revolucio marŝis de venko al venko. Hodiaŭ la revolucia Gínggang-montaro jam fariĝis revolucia sankta loko sopirata de la popolo, kaj multaj laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj fremdlandaj amikoj ĝin vizitas ĉiujare. Post la Liberiĝo, “**disvolvante la revolucion tradicion kaj strebante por akiri pli grandan honoron**”, la popolo de Gínggang-montaro daŭre kondukas la revolucion kaj faras grand-skalan konstruadon, strikte sekvante Prezidanton Maŭ. Nun oni jam povas veturi per aŭto rekte al Gínggang-montaro laŭ la larĝa ŝoseo. Ciping, la centro de Gínggang-montaro, jam konstruiĝis en novan monturbon, kie troviĝas la Muzeo de la Revolucia Bazo de Gínggang-montaro, librejo, magazeno, hospitalo, aŭtostacio, teatro, fabrikoj kaj lernejoj. Ĉie en tiu montaro aperis nova fizionomio de vigla prosperiĝo.

Ĉiam flirtos la ruĝa flago de Gínggang-montaro!


La Ĉina Popola Liberiga Armeo

Estas Granda Lernejo



Lernantoj de la Milita kaj Politika Universitato de ĈPLA studas verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ.

Batalantoj de la oka roto de iu trupo
gardstaras borde de la maro Bohaj.



Komandantoj kaj batalantoj garnizonantaj ĉe Langōu-a regiono kaj mongolaj kaj hanaj
milicianoj kune patrolas por defendi la nordokcidentan landlimon de la patrolando.



Batalantoj de la fervojaj inĝenieraj trupoj sin ekzercas en grimpado.





Kombajnoj de la "Maj-sepa" Armea Kulturejo de la Nankinaj Trupoj rikoltas tritikon.

Dum sia ekzerca kampadado, la propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de iu trupo de ĈPLA prezentas la revolucionan modernan pekinan operon *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*.




Komandantoj kaj batalantoj de la Mara Armeo peneme sin ekzercas.




Komandantoj kaj batalantoj de la aeraj fortoj de la Mara Armeo de ĈPLA resumas flugan sperton.

Dekstre supre: Kamarado Vang Ĝanŝan, batala heroo kaj regimentestro, faras militan trejnadon kune kun batalantoj en bazaj unuoj.

Dekstre malsupre: Bredejo de militaj ĉevaloj de la Ginan-aj trupoj.





Iu altebena ser-
vo-taĉmento de la
Langou-aj trupoj
flikas vestojn kaj
riparas ĉiutagajn
bezonaĵojn por
batalantoj.



Kuracistinoj de iu
trupo garnizonan-
ta ĉe Hajnan-in-
sulo donas medi-
cinan helpojn al
miaŭ-popolanoj.

Armitaj Bataloj de Nia Montvilaĝo

GIAŬGUANGHU estas montvilaĝo kun ĉirkaŭ 300 familioj ĉe la monto Vajtuo pli ol 100 liojn nordoriente de Pekino.

En la periodoj de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la popolo de Giaŭguanghu prenis armilojn kaj faris longan bravan batalon kontraŭ la japana imperiismo kaj la kuomintang-aj reakciuloj. Per malnovtipaj pafiloj kaj kanonoj la popolo venkis la malamikojn fojon post fojo, sukcese defendis la hejmlokon, forte subtenis la revolucion militon kaj komponis per tio triumfan kanton de popola milito.

PRENU GLAVOJN KAJ PAFILOJN POR FARI REVOLUCION

En somero de 1937, la japana imperiismo komencis ampleksan agresan militon kontraŭ nia lando. La kuomintang-aj reakciuloj perfidis la nacion kaj ne faris reziston kontraŭ la malamikoj, tiel ke nia bela lando estis kruele tretata de la japanaj diabloj kaj nia nacio falis en diluvon kaj incendion.

Por savi la nacion, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio gvidis la Okavojan Armeon, Novan Kvaran Armeon kaj vastan revolucionan popolon al fondo de kontraŭjapanaj bazoj por persisti en rezisto kontraŭ la japana imperiismo. Nia Giaŭguanghu estis enirejo de la liberigita regiono de orienta Hebej-provinco. Tiam la japanaj diabloj konstruis ĉirkaŭ la vilaĝo apogpunktojn kaj reduktajn, el kiuj la apogpunkto Longvantun distancis nur 2 liojn sude de ĝi. La diabloj ofte venis al la vilaĝo por "balai", bruligante domojn, masakrante kaj prirabante vilaĝanojn. Ili mortigis dekkelkajn el niaj klasaj fratoj kaj forkaptis pli ol 20 gejunulojn. La japana imperiismo ŝuldadas al ni multe da sango.



Kamarado Ma Fu

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, observante la instruon de Prezidanto Maŭ, la Okavoja Armeo sendis al nia vilaĝo laborgrupon por propagandi pri rezisto kontraŭ la japana imperiismo kaj helpi nin starigi partian filion. Ekde tiam la popolo de Giaŭguanghu faris, sub la gvido de la partia filio, malcedeman batalon kontraŭ la japanaj agresantoj.

Komence ni ne havis pafilojn, sed ĉiuj diris: "Ekstermu la diablojn por defendi la hejmlokon kaj venĝi niajn mortigitajn klasajn gefratojn!" "Ni batalu malgraŭ ke ni ne havas pafilojn. Kondiĉojn



*Montrante al milicano-
noj tunelon, kamara-
do Ma Fu rakontas,
kiel oni siatempe ba-
tis japanajn agresan-
tojn.*

kreas la homoj.” Ni do klopo-dis por elfari malnovtipajn pafilojn kaj kanonojn, forĝis glavojn kaj lancojn kaj starigis nian propran armitan forton.

Komenciĝis la batalo de Giaŭĝuanghu sub la gvido de la Partio kaj sub la direktado de la granda penso de Prezidanto Maŭ “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**”.

BATI LA DIABLOJN

Iun fruan matenon, grupo da japanaj diabloj iris el malhela reduto de apogpunkto kaj paradaĉe venis por fari la tiel nomatan “balaadon”. La partia filio kunvokis urĝan kunvenon kaj analizis la situacion de la malamikoj kaj decidis surprizi la malamikojn. Informiĝinte pri la decido, la milicanoj atendis la ekagon kun brula deziro. Kun profunda malamo al la japanaj agresantoj, tenante malnovtipajn pafilojn kaj glavojn la milicanoj kuris sub la komando de grupestro Ma Venzaŭ en la direkton kie aperis la malamikoj. Ĉe la vilaĝofino ili renkontiĝis kun la malamikoj. Tuj eksplodis batalo. Tiam ankaŭ milicanoj de najbaraj vilaĝoj venis por partopreni la batalon. La diabloj ne povis rezisti nian atakon kaj sin returnis por forfuĝi. Ni persekutis en venko la malamikojn ĝis ilia nesto Dabejvu. Nia unua batalo triumfis kaj donis grandan kuraĝigon al la popolo. Svingante la pafilojn

kaj glavojn en siaj manoj, la milicanoj diris kun granda ĝojo: “Niaj malnovtipaj armiloj venkis la modernajn pafilojn kaj kanonojn de la diabloj!”

La diabloj morte timis la armitan popolon kaj intencis estingi per ĉia rimedo la revolucion fajron de Giaŭĝuanghu. Ni organizis la tutan popolon de la vilaĝo. La virinojn ni organizis en Virinan Asocion, kiu ĉefe respondecis pri postfronta servo. La geknaboj starigis por si Ligon de Geknaboj, kiu respondecis pri gvatado kaj observado al la malamikoj. Junuloj kaj plenaĝuloj aliĝis al milico. Ni tenis pafilon en unu mano kaj sarkilon en la alia por produkti kaj batali samtempe. Ni ne nur batis la malamikojn tiel, ke ili ne povis eniri en nian vilaĝon, sed ankaŭ atakis la malamikojn kaj detruis iliajn trafikajn liniojn. Sude de nia vilaĝo estis grava ŝoseo kondukanta al Pekino, kaj sur ĝi senĉese kura-dis militaj kamionoj de la malamikoj. Nokte ni fosis transversajn sulkegojn sur la ŝoseo per ŝpatoj kaj pioĉoj. Krome ni renversis fervojon, detruis pontojn per eksplodado, tranĉis telefonajn dratojn, tiel ke ĉe la malamikoj kelkdek liojn ĉirkaŭ nia vilaĝo ĉesis funkcii la telefonoj, trajnoj kaj aŭtoj. La malamikoj dronis en la senlima maro de popola milito kaj ege timis. La japanaj agresantoj en la apogpunkto Longvantun ŝteliris en la malproksiman vilaĝon Vangpan kaj devigis pupan trupon resti por gardi la apogpunkton.

La pupaj armeanoj, kiuj antaŭe helpis la diablojn en krimoj, nun fariĝis hundoj perdintaj la mastron. En unu sola nokto, ni milicanoj kaj gerila taĉmento jam ekstermis ilin.

VASTA ENTERIGO DE MINOJ

En la batalo kontraŭ la malamikoj, ni fosis en nia vilaĝo tunelon kun longeco de 11.5 kilometroj. En la tunelo ni povis ataki kaj defendi. Per tio ni fiaskigis multfojajn atakojn de la malamikoj. Krom tio, ni vaste enterigis minojn, kiuj tute teruris la malamikojn.

Tiam, ĉiuvespere tuj post sunsubiro, milicano laŭte kriis sur la tegmento de la milica oficejo: "Samvilaĝanoj! Ne iru el la vilaĝo, la mingrupoj enterigas minojn!" Poste la 8 mingrupoj ĉiuj iris enterigi minojn ĉirkaŭ la vilaĝo kaj ĉe la enirejoj. Ili ne nur enterigis, sed ankaŭ pendigis minojn sur plektitajn pordojn, ĉambropordojn kaj arbojn. Inter la minoj estis minoj facile videblaj, kaŝitaj, veraj kaj falsaj, kiuj strikte blokadis la vilaĝon.

Estis multaj specoj de minoj. Sur la gravaj enirejoj de la vilaĝo ni enterigis ĉenminojn, sur plektitajn pordojn ni pendigis tirminojn, kiuj eksplodis ĉe ekpuŝo de la pordo. Antaŭvidante ke malamikoj povis tondi la facile videblan ŝnuron de prajmo de

mino, ni enbatis najlon en la fundon de la minkavo, aldonis maldikan draton al la prajmo, tiel ke kiam malamiko fortondis la videblan ŝnuron de la prajmo kaj ekprenis la minon, la kaŝita drato estis tuŝita kaj la malamikoj tuj estis dispecigitaj je eksplodo. Ni enterigis minojn per malsamaj manieroj en ĉiu tago, tial la malamikoj neniam povis scii pri nia regulo.

Per minoj ni ne nur defendis nin, sed ankaŭ atakis la malamikojn. Foje, ni milicanoj kaj gerila taĉmento iris surprizi militan kamionon de japanaj diabloj. Ni venis al la ŝoseo inter Pekino kaj Mijun kaj tie enterigis minojn. Poste ni embuskis en milia kampo flanke de la ŝoseo. Fine brue alkuris kamiono de la diabloj. "Pum!" ĝi ruliĝis en la foŝojn apud la ŝoseo. Ni tuj alkuris kaj mortigis du diablojn, kaptis 1 fusilon, pli ol 500 kuglojn, 1 radiodissendilon kaj militajn aliajn materialojn.

Ni ofte starigis sur vojoj tabulojn kun la surskribo "Jen mino malgranda kun fort' giganta, diablojn kaj pupajn armeanojn ekstermanta". Vidinte tion la malamikoj sakris kaj saltis de kolero kaj ek-tiris la tabulojn. "Pum!" La tabuloj tuŝis la prajmon de minoj enterigitaj sub la tabuloj kaj la malamikoj senpage flugis per nia "aeroplano". Kaj poste, malamikoj ne plu kuraĝis eltiri tiajn tabulojn kaj povis nur sakri.

Milicanoj en meza Hebej enterigas minojn.



BRILA PAĜO

Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, post 8-jara peniga rezistado, nia popolo fiaskigis la agresan militon de la japana imperiismo per revolucia milito. Sed subtenate kaj helpate de la usona imperiismo, Ĉiang Kajŝek komencis kontraŭrevolucion enlandan militon kontraŭ la komunistoj kaj la popolo. La apogpunktojn starigitajn de japanaj diabloj ĉirkaŭ nia Giaŭĝuanghu tiam okupis banditaj trupoj de Ĉiang Kajŝek kaj armitaj fortoj de bienuloj.

Observante instruon de Prezidanto Maŭ ni decidis disvolvi la gloran tradicion de la Kontraŭjapana Rezistmilito, venki Ĉiang Kajŝek kaj konstrui novan Ĉinion. Ni reordigis la organizojn de milico, rekonstruis la tunelojn kaj faris intensan batalon kontraŭ la kuomintang-aj reakciuloj. La kuomintang-aj reakciuloj rigardis nian Giaŭĝuanghu kiel oston en gorgo kaj kriaĉis ke ili ebenigos Giaŭĝuanghu kun la tero. Sed iliaj multfojaj atakoj trafis nur fiaskon.

En decembro de 1948, la granda popola liberiga armeo komandata de Prezidanto Maŭ marŝis en Ŝunji-gubernion; la armita batalo de nia Giaŭĝuanghu venkis finfine. Kun feliĉaj larmoj ni bonvenigis niajn karulojn de ĈPLA.

Retrorigardante la batalon en nia montvilaĝo, ni konstatis, ke la batalo estis kondukata sub la direktado de la granda penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito. Ni mobilizis la popolon, armis la popolon, sin apogis sur la popolo kaj faris popolan militon, plenumis strategion kaj taktikon de popola milito kaj venkis la malamikojn kun modernaj ekipaĵoj, uzante niajn malnovtipajn pafilojn, kanonojn, glavojn kaj lancojn.

En la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj Liberiga Milito, ni faris pli ol 100 batalojn, mortigis kaj vundis pli ol 100 malamikojn, kaptis pli ol 40 malamikojn, detruis 1 malamikan kamionon, kaptis 1 radiodissendilon, nombron da pafiloj kaj kvanton da municio kaj aliaj militaj materialoj. En la tuta militado nur du el niaj milicanoj oferis sian vivon.

La bataloj de nia montvilaĝo montris: Ĉiuj imperiismo kaj reakciuloj de la mondo estas paperaj tigroj. Vere fortaj nur estas la popoloj armitaj per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Oni certe povos venki agresantojn kaj ĉiujn reakciulojn, se ili observos la principon de Prezidanto Maŭ pri popola milito, kuraĝas batali kaj venki.

**Kamarado Ma Fu estas komitatano de la partia filio de Giaŭĝuanghu kaj estis vilaĝestro en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj Liberiga Milito.*

Kombino de produktado kun nacia defendo por ĉiam esti pretaj rebati agresantojn



Tunelaj Bataloj de Ĵanĝuang

EN la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento, la japana imperiismo lanĉis grandskalan agresan militon kontraŭ nia lando, kun aroganta ambicio ĵugi Ĉinion kaj aneksi Azion.

Tio, kion mi rakontos ĉi-sube, okazis preskaŭ 30 jarojn antaŭe. Ja estas multaj rakontindaĵoj pri la batalado de niaj Ĵanĝuang-aj milicianoj, kiuj rezistis kontraŭ la japanaj agresantoj utiligante tunelojn. Mi rakontos nur pri kelkaj el ili.

MOBILIZO DE LA AMASOJ

Ĵanĝuang situas en Kingjuan-gubernio, en la meza ebenejo de Hebej-provinco, kie mankas montoj kaj ŝlosilaj pozicioj facile defendeblaj kaj ŝirmodonaĵoj.

Je la fino de aŭtuno, 1941, la japanaj agresantoj okupis la gubernian urbon de Kingjuan. Por eviti buĉadon kaj rabadon fare de la japanaj agresantoj, niaj vilaĝanoj fosis en kaj ekster la vilaĝo multajn simplajn ŝirmejojn kun unu elirejo. En la komenco kiam la japanaj kaj pupaj soldatoj venis al nia vilaĝo por prirabado kaj arestado, ni povis kaŝi nin en tiuj ŝirmejoj. Tamen ili montriĝis poste ne plu taŭgaj, kiam ilia venado longdaŭre plioftiĝis.

Somere de 1942 la japanaj rabistoj faris kruelan "balaadon" kontraŭ la kontraŭjapanaj bazoj kaj gerilaj regionoj en la meza parto de Hebej kaj praktikis la politikon de forbruligo, forbuĉo kaj prirabo kontraŭ la loĝantaro. Ili konstruis 3 fortikaĵojn, 15 gvatajn turojn kaj 4 ŝoseojn en la areo ĉirkaŭ Ĵanĝuang kun periferio de pli ol 10 kilometroj. La bela kaj riĉa ebenejo fariĝis nun infero. La malamikoj ofte iris en nian vilaĝon por fari malbonaĵojn kaj la sekreto de la ŝirmejoj estis baldaŭ malkaŝita.

La kruela batalo prezentis al ni tre aktualan problemon: al la furiozaj "balaaj" atakoj, oni jam ne povis sin savi per pasiva rimedo de fuĝado, sed nepre devis sin organizi por aktive batali kontraŭ la malamikoj.

En tiuj malfacilaj tagoj, la sekretario de la distrikta partia komitato kamarado Ĝang Senlin mobilizis la Ĵanĝuang-anojn al persista armita batalo. Ankaŭ la gubernia partia komitato sendis al ni kadrojn, kiuj kunvokis kunvenon de la milicianoj kaj revoluciaj amasoj de Ĵanĝuang kaj organizis nin por lerni la instruon de Prezidanto Maŭ: **"La mobilizado de la ordinaraĵoj tra la tuta lando kreos vastegan maron por dronigi la malamikon, kreos la kondiĉojn por kompensi nian malsuperecon en armiloj kaj aliaj aferoj kaj kreos la antaŭkondiĉojn por venki ĉiujn malfacilojn en la milito."** Ni resumis sperton kaj lecionojn de la pasintaj bataloj kaj decidis transformi la ŝirmejojn kun unu elirejo en tunelojn kun du aŭ pluraj elirejoj, por ke ni povu fuĝi tra alia elirejo, kiam la malamikoj trovis unu el ili. Poste ni kunligis tiujn izolitajn tunelojn kaj disvolvis tunelajn batalojn.

La amasoj estis mobilizitaj: en unuanimeco oni faris produktajn laborojn kaj gardostaris tage kaj fosis tunelojn nokte. Ĝis la komenco de 1945, ni jam pretiĝis 4 ĉefajn tunelojn ĉirkaŭ la vilaĝo, de kiuj disetendiĝis 24 branĉaj tuneloj. Krome, ni ankoraŭ fosis tunelojn longajn sume 15 km. por komunikiĝi kun la najbaraj vilaĝoj. En tiuj tuneloj sin trovis komandejo, ripozejoj, grentenejoj, kuirejoj, necesejoj kaj estis instalitaj vojmontriloj kaj olelampoj ĉe kruciĝejoj. La tunelfaŭkojn ni faris ĉe ŝirmitaj lokoj, ekzemple: ĉe murpiedoj, sub terlitoj, sub fornoj kaj en forlasitaj putoj. La aper-turojn ni provizis per turneblaj fermtabuloj, enfal-



Gaŭ Ĝenfu (meze) rakontas pri siatempaj tunelbataloj.

joj kaj kaŝitaj pordoj. Kiam malamiko eniris, ni povis mallevi la fermtabulon por bati la enfermitan malamikon. Se la malamiko enlasis venenan gason, la tabulo ankaŭ povis bari ĝian eniron. Se la malamiko enkondukis akvon en la tunelon, ni ankaŭ povis forkonduki ĝin.


LA UNUA VENKO

Post kompletigo de la tuneloj, la partia filio tuj organizis milicianojn por studi la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Inter la celoj de milito ekstermo de la malamiko estas la ĉefa, dum sinkonservo estas duavica, ĉar nur per ekstermo de la malamiko en grandaj nombroj oni povas efike sin konservi.”** Tio komprenigis al ĉiuj ke oni devas ne nur pasive defendi sin, sed ankaŭ aktive ataki la malamikon. Sekve, ni faris multajn gvatajn kaj pafajn truojn al la tuneloj kaj konstruis en la vilaĝo batalkonstruaĵojn sur tegmentoj kaj en kaŝitaj ĉambroj komunikantaj al tuneloj, tiel ke formiĝis sistemo da plurvicaĵaj tu-

neloj fortikigitaj kaj interkruciĝantaj en kaj ekster la vilaĝo, sur kaj sub la tero.

Je la fino de marto 1945, la japanaj kaj pupaj trupoj el 600 homoj intencis ataki Ĵanĝuang kaj aliajn vilaĝojn. Informiĝinte pri tio la partia filio de Ĵanĝuang urĝe kontrolis en la nokto la defendajn punktojn kaj munician preparetecon; ankaŭ la virinoj aktive preparis manĝaĵon; kaj milicianoj enterigis minojn: ĉiuj preparaj laboroj estis finitaj antaŭ la batalo.

Frumatene de la 1-a de aprilo, la malamikoj komencis marŝi al Ĵanĝuang. Niaj milicianoj en formacio de du kolonoj batalis renkonte al la malamikoj, kunage kun la distrikta taĉmento kaj milicianoj de najbaraj vilaĝoj. Post mallonga batalo ni rapide eniris tunelojn. Kun supereco en forto la malamikoj fiere kaj impertinente sturmis en la vilaĝon, sed enirinte ĝin ili ne trovis eĉ unu homon kaj tute malkaŝis sin antaŭ niaj pafkampoj de paftruoj kaj unu post alia trafis kuglojn. Bando da



Milicano batalanta en tunelo kontraŭ japanaj agresantoj

malamikoj urĝe forkuris returne, sed kiam ili venis al vojkruciĝo, ilin ekstermis eksplodigo de du minoj de la milicanoj en du kaŝitaj ĉambroj en nordorienta kaj nordokcidenta anguloj. La aliaj malamikoj diskuris en ĥaoso por savi sian vivon, kaj inter ili nemalmultaj mortis kaj vundiĝis de minoj. En la sama tempo, la distrikta taĉmento kaj milicanoj de najbaraj vilaĝoj ekster la vilaĝo konfuzis la malamikojn: iuj blovis litorinojn kaj aliaj pafis per lignaj kanonoj. La tuta vilaĝo fariĝis batala fortikaĵo, la malamikoj estis konsternitaj kaj embarasitaj, kaj devis retiri sin el la vilaĝo.

En tiu tempo la 18-a regimento de niaj kampaj trupoj de la meza Hebej baris la retiriĝantajn malamikojn kaj milicanoj persekutis ilin en venko. La malamikoj suferis pezan perdon kaj forkuris ĥaose.

La unua venko de Ĵanĝuang en batalo per tuneloj multe inspiris batalvolon de la amasoj kaj ege debatis la arogantecon de la malamiko.

PLENA EKSTERMO DE MALAMIKOJ

La malamiko, tamen, ne volontis akcepti sian malvenkon kaj refoje provis invadi Ĵanĝuang per unu regimento matene je la 20-a de junio 1945. Niaj milicanoj jam delonge sin preparis al batalo. Ankoraŭ ne enirinte la vilaĝon, la malamiko falis en la embuskon de niaj milicanoj. Kun konsterno kaj kolero la malamiko koncentris siajn atakojn al la vilaĝo per maŝinpafiloj kaj kanonoj. Ni rezistis per malgranda forto ĉe la vilaĝkapo, kun la celo logi la malamikojn en nian reton antaŭe aranĝitan.

Enirinte la vilaĝon, la malamikoj ne plu povis uzi la kanonojn, kaj nur la maŝinpafiloj ankoraŭ krakadis serĉante nevideblajn celojn.

Apenaŭ unu malamika oficiro kun pli ol 20 japanaj kaj pupaj soldatoj sub sia komando proksimiĝis al nia militinstalaĵo ĉe la malgranda tem-



Gerilanoj efike batas la malamikon en sia medio.

plo, li trafis kuglon ĉe la brusto kaj falis teren. Iom poste japanaj rabistoj pelis tien pupajn soldatojn por porti la kadavron. En palpebrumo kelkaj estis faligitaj de kugloj. La malamikoj historie kriis: "Jen homoj en la malgranda templo!" "Maŝinpafiloj! Rapidu!" La maŝinpafiloj de la malamiko pafis al la templo, sur kies muro ekaperis granda truo kaj kugloj falis ĉirkaŭ la tunela aperturo. Malamikoj alsturmis. La estro de milica eksplodiga grupo aplombe rezistis kaj ĵetis al la malamikoj du mangrenadojn. En densa fumo la milicanoj eniris en la tunelon. Tiutempe, al la malamikoj pafiĝis venĝemaj kugloj el kaŝitaj fortikaĵoj sude de la vilaĝo, el kaŝpafejoj ĉe vojkruciĝo, sur kaj sub tegmentoj kaj el ĉiuj embrazuroj sur kaj sub la tero. Kvazaŭ sovaĝa bovo entrudiĝinta en fajron, la malamikoj ĉie ricevis batojn kaj eksplodigojn. Vidinte la situacion tre malfavoran, la malamikoj povis nur urĝe forkuri kun la kadavroj de siaj kolegoj.

Ni faris 17 tunelajn batalojn, mortigis kaj vundis pli ol 200 malamikojn.

En 1945, en la antaŭvespero de kompleta disfalo de la japanaj rabistoj, la malamikoj en la fortikaĵoj ĉirkaŭ Ĵanĝuang retiris sin en Ĝangmangĝen. La Ĵanĝuang-aj milicanoj, en kunagado kun iu trupo de la Okavoja Armeo, lokaj armitaj fortoj kaj milicanoj de najbaraj vilaĝoj, dense sieĝis la malamikan apogpunkton, fosis tunelon ĝis sub malamika gvatturo kaj enterigis dinamitajn pakojn. Post tio ni kriis al la malamikoj ke ili kapitulacu, sed tion ili rifuzis arogante. Ni do eksplodigis la fortikaĵon, kaj la postvivintaj malamikoj ankaŭ falis en nian embuskon dum forkuro kaj senesepte estis ekstermitaj.

**La verkinto estis siatempe milica kompaniestro de Ĵanĝuang.*

Marŝas la Popolo de Ŝanghang

LA gubernio Ŝanghang kiu situas apud Ting-giang-rivero en Fugian-provinco estis revolucia bazloko persone fondita de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, en la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937). En decembro de 1929, estis okazigita en Gutian de tiu gubernio Gutian-kunveno t. e. la Naŭa Partia Kongreso de la Kvara Armeo de la Ruĝa Armeo, kiu havas grandan historian signifon. La rezolucio *Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio* skribita de Prezidanto Maŭ por la kongreso, montris direkton por la konstruo de nia Partio kaj nia armeo.

La granda revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ kaj la ĉiam brila rezolucio de Gutian-kunveno direktas la popolon de Ŝanghang brave marŝi sur la revolucia vojo. Antaŭ la Liberiĝo, la komunistoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj amasoj de Ŝanghang faris bravan batalon kontraŭ la kuomintangaj reakciuloj; post la Liberiĝo, ili firme batalis kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj senŝanceliĝe defendas la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Kaj dank' al la hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la popolo de Ŝanghang ricevis tute novan spiritan fizionomion.

DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

La milica roto de la brigado Vulong, kiu multajn jarojn batalas kaj vivas proksime de la loko de Gutian-kunveno, estas avangarda kolektivo sentime defendanta la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. La estro de la roto Liaŭ Ĝongĝu lernas la revolucion spiriton de la tiamaj ruĝaj

armeanoj kaj ruĝgvardianoj, persiste elstarigas la proletaran politikon kaj plenenergie faras revolucionajn laborojn. En 1964, la kontraŭrevolucia reviziisto Luo Ĵujking iris al Gutian por malhelpi, per "konkurso de milita tekniko", la milicianojn elstarigi la proletaran politikon. En tiu tempo, sub la helpo de la heroo roto "La Ruĝa Kvara Roto" de ĈPLA veninta al Gutian por politika kampado, la milica roto de Liaŭ Ĝongĝu levis tajdon de studo de la rezolucio de Gutian-kunveno kaj *La Rezolucio de la Plivastigita Kunveno de la Milita Komisiono sub la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri Pliintensigo de Politika kaj Ideologia Laboro en la Armeo* aprobita en 1960, kiu heredis kaj disvolvis la tradicion de Gutian-kunveno; ili bojkotis la inferan venton de "konkurso de milita tekniko" kaj defendis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

En printempo de la pasinta jaro, Ŝanghang trafis pluvadon kun malalta temperaturo dum longa tempo malofte okazintan en la pasintaj jardekoj kaj multe da semoj kaj plantidoj putriĝis. Por venki la naturan katastrofon, Liaŭ Ĝongĝu kaj lia roto tagnokte laboris sur la kampoj disvolvante la gloran tradicion de brava batalado de la Ruĝa Armeo. Kiom da semoj kaj plantidoj putriĝis, tiom ili resemis denove. Fine ili sukcesis plivastigi la areon de frua rizo kaj akiris abundan rikolton. Ilia ago donis ekzemplon al la aliaj.

En Cajhi-brigado de Cajhi-komunumo ĉe la rivero Cajhi vivas revolucia avino Vang Kiulian. Ŝi estas kompartianino kun la aĝo de pli ol 60 jaroj. En la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, kiam Prezidanto Maŭ venis al Cajhi kun la Ruĝa Armeo sub sia gvido, ŝi estis reprezentanto



Maljuna kompartiano Vang Kiulian, kiu siatempe instigis sian edzon aliĝi al la Ruĝa Armeo.

de virinoj de la vilaĝo. Dank' al ŝia admono ŝia edzo aliĝis al la Ruĝa Armeo. Ŝi kaj aliaj virinoj eklaboris surkampe anstataŭ siaj edzoj kiuj partoprenis la Ruĝan Armeon, kaj produktis multe da greno por subteni la fronton.

En 1949, post la liberiĝo de Fugian-provinco, Vang Kiulian denove estis elektita kiel reprezentanto de virinoj de la vilaĝo. Same kiel en la pasintaj jaroj en kiuj ŝi sekvis Prezidanton Maŭ en revolucio, ŝi staras sur la plej antaŭa fronto de klasbatalo kaj linia batalo kaj brave defendas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. En la komenca periodo post la Liberiĝo, ŝi aktive ĵetis sin en la movadon de ekstermo de banditoj kaj batalo kontraŭ lokaj tiranoj. Kiam la renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Fugian-provinco ekblovis en la kamparo la inferan venton "difini produktan kvoton al ĉiu familio" por restaŭri kapitalismon, Vang Kiulian firme oponis kontraŭ ĝi kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ŝi pacience propagandis al la aliaj: "La agraro delonge jam apartenas al la kolektivo kaj nun se iu volas dividi ĝin en malgrandajn

pecojn inter individuoj kaj difini produktan kvoton al ĉiu familio, tio ne konformas al la socialisma direkto montrita de Prezidanto Maŭ. Ni neniam devas tion fari!" Ili persistis en kolektiva produkto. Pro ilia opono, la brigado rapide haltigis la inferan venton.

Vang Kiulian ofte parolas pri la pasintaj amaraĵoj al la junaj kadroj en la brigado por altigi ilian klasan konscion, por ke ili pli zorgu kaj amu la kolektivon kaj plibonigu la produkton.

ANTAŬIRANTOJ DE REVOLUCIO

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, post intensa batalo inter la du klasoj kaj du linioj, naskiĝis la revolucia komitato de Ŝanghang-gubernio. Ĉiuj kadroj ĉu junaj aŭ maljunaj de la revolucia komitato, sentas feliĉon kaj gloron ke ili povas labori en la malnova revolucia bazloko persone fondita de Prezidanto Maŭ. Ili decidis heredi kaj disvolvi la gloran revolucionan tradicion kaj esti antaŭirantoj en plenumo kaj defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La unua plena kunveno de la gubernia revolucia komitato prenis lokon, kie okazis Gutian-kunveno. En la kunveno veterana ruĝgardiano rakontis al la ĉeestantoj pri sia batalo sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Ili refoje studis la rezolucion de Gutian-kunveno kaj ricevis profundan edukon de revolucia tradicio kaj linia batalo. Tuj revoluciaj kadroj, kiuj antaŭe laboris kiel gvidantoj en la malnova gubernia komitato de la Partio, diris emocie: "En la pasinteco, kvankam ni laboris en la malnova revolucia bazloko Ŝanghang, tamen ne sciis fari ĉion laŭ la rezolucio de Gutian-kunveno; kelkiam ni donis atenton nur al produkto, sed ne al elstarigo de proletara politiko, kaj rezulte de tio aperis multaj problemoj kvankam ni multe penadis. De nun ni nepre konscie plenumos la revolucion linion de Prezidanto Maŭ."

En la laborplena sezono de printempa plugado kaj semado, la popolo de la gubernio entuziasme tenas la revolucion, tiel ke rapide iras la produkto.

Sed en iu komunumo profunde en montoj, la produkto estis malpli bona ol tiu de aliaj lokoj. La estro de la gubernia revolucia komitato venis al tiu ĉi komunumo, faris detalan enketon, plene mobilizis la amasojn, forte tenis klasbatalon, kaj sub lia gvido la amasoj kritikis kapitalismajn tendencojn, malkaŝis subfosantojn de kolektiva produkto, tiel ke la printempa plugado kaj semado de tiu ĉi komunumo rapide plenumiĝis bonkvalite.

La revolucia komitato de Ŝanghang-gubernio serioze resumis sperton kaj eltiris lecionon el tiu ĉi afero, ellaboris efektivegeblan lernoplanon kaj gvidis la tutan popolon de la gubernio pli profunde disvolvi la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, tiel ke aperis nombro da avangardaj kolektivoj kaj personoj.

SANE KRESKAS NOVA GENERACIO

En la gubernio Ŝanghang estas pli ol dek mil intelektaj gejunuloj, kiuj venis de diversaj lokoj

Komunumanoj de Ĉajhi-brigado transplantas rizplantedojn.



de la provinco por fariĝi kamparanoj kaj akcepti reedukon ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili estas freŝa forto en konstruado de nova socialisma kamparo. Inter ili aperis multe da aktivuloj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj multaj glore fariĝis membroj de la Komunista Partio de Ĉinio aŭ la Ĉina Komunisma Junulara Ligo.

La estro de iu produkta grupo de Gutian-komunumo Vang Guoĝang estas 20-jara intelektulo. Antaŭ 2 jaroj li venis al Gutian kaj modeste lernis de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li kunportis el lia urbo kompleton da novaj instrumentoj kaj post nur unu jaro la sarkilo jam eluziĝis, la vekto rompiĝis kaj la fekaĵkorboj tute difektiĝis. Pro lia progresemo kaj bona laboro, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis lin kiel estron de la produkta grupo.


Post kiam li fariĝis grupestro, maljunaj malriĉkamparanoj sincere diris al li: “Prezidanto Maŭ skribis en nia loko la rezolucion por Gutian-kunveno, ni vivas en Gutian kaj devas senŝanceliĝe plenumi la rezolucion, konscie akcepti la gvidon de la Partio kaj komandi ĉiun nian laboron per politiko.” Sub la gvido de la partia filio de la produkta brigado, Vang Guoĝang unue serioze fun-

kciigis la vesperan politikan lernejon de la grupo, organizis la grupanojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ por ke ili firme starigu la penson terkulturi por la revolucio. En la pasinta jaro, en la grupo aperis nombro da aktivuloj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la produktokvanto de la grupo duobligis.

La brigado Ŝeŝan de Nanjang-komunumo de la gubernio havas montplugan taĉmenton konsistantan el 10 intelektaj gejunuloj. Ili meminciate prenis sur sin la taskon bonigi la kelkdek muojn da sterilaj kampoj sur iu dezerta monto. Sur la monto estas nur kaduka templo kaj ili havis nur unu maljunan bubalon. Sed ili ne estis timigitaj de la malfaciloj. En la unua nokto post sia alveno ili rememoris en la kaduka templo la gloran revolucionan praktikon de penema lukto en malfaciloj fare de la Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ, por kuraĝigi sin en batalo kontraŭ la sovaĝa naturo. Tie la monto estas alta kaj la akvo malvarma kaj oni neniam kulturis dufoje rizon en unu jaro; sed la junuloj uzis frue maturiĝan specion kaj aplikis la metodon de transplantado de plantidoj kune kun tero. Post peniga laboro de unu jaro ili akiris abundan rikolton de greno kaj per tio elhakis novan vojon por dufoja kulturo de rizo en unu jaro sur alta monto kun malvarma akvo.

ĈPLA-anoj relernas en la loko, kie okazis Gutian-kunveno, ĝian faman rezolucion.





LA vastaj amasoj de komandantoj kaj soldatoj de la heroaj inĝenieraj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo de multaj jaroj batalas sur nia bela lando por plenumi penigajn konstrutaskojn. Firme memorante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ timi nek malfacilojn nek morton, ili venkis torentajn riverojn kaj krutajn montojn, kaj faris per tio gigantajn kontribuojn por defendi kaj konstrui la grandan socialisman Patrion.

KABLA PONTO

La 3-a kompanio de iu inĝeniera trupo de ĈPLA, kiu estas avangarda kolektivo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, ricevis ordonon konstrui 200 metrojn longan kablajn ponton 20 metrojn super la rivernivelo en ravino.

La ravino estas inter altaj rokoj, kiuj rekte leviĝas ĝis la ĉielo. Iuj diris: "Neeblas konstrui ponton ĉi tie, ponton ni havus, nur se ĉielarko suben malleviĝus." Fronte al la krutaj rokoj kaj impetanta torento, komandantoj kaj batalantoj de la 3-a kompanio, plenaj de heroismo, diris: "Neniu malfacilo povos bari nin kaj ponto nepre pendos super la ravino."

Por instali pendoponton, antaŭ ĉio oni devas fari kavegojn ambaŭflanke sur la rokmuroj kiel bazojn por fiksi kablojn. La batalantoj pendigis sin sur la rokoj per longa ŝnurego liganta je la talio kaj peneme enhakis la rokojn per marteloj 12 funtojn pezaj. Kiam la kavegoj estis faritaj sur la rokoj, oni devis enrampi kaj plenigi ilin per betono. Tiu laboro estis malpura kaj laciga. Komunisto Liu Kiaŭ-

jang, batalanto kun kvin bonoj, la unua rampis senhezite en la kavegon por la laboro.

Kiam la bazoj estis konstruitaj, kaj kabloj estis kondukita trans la ravinon, necesis sendi iun por starigi celstangojn sur la mezon de la kabloj super la rivero por niveli la ponton. En tiu tempo vento kaj pluvo alportis grandan malfacilon al la laboro. Komunisto Vang Gianbang elpaŝis kaj alkroĉis la pulion ligitan je sia talio sur la kablajn. Li tenis celstangojn per unu mano, kaptis kablajn per la alia kaj glitis al la mezo de la kablo. Kiam li atingis la destinitan lokon kie li devas fiksi la celstangojn, li havis nenion por subteni sin pendante en la aero, kaj por fikse starigi la celstangojn per unu mano, la forto ne sufiĉas; uzante ambaŭ manojn, la korpo turniĝas; kaj krome li ne povis malfermi la okulojn pro vento kaj pluvo. La laboro estis tre malfacila. Tiam li subite levis siajn gambojn por kroĉi sin sur kablo per la du kruroj ĝin premantaj kun la kapo malsupren. Li pene laboris en la aero, fiksas celstangojn sur ĉiujn kablojn kaj venke plenumis la taskon.

Per la sentima heroismo la komandantoj kaj batalantoj de la 3-a kompanio konstruis ŝtalan kabloponton super la ravino.

BATALO KONTRAŬ GLACIA TORENTO

Furioze muĝante, la Flava Rivero rapide torentas malsupren al maro.

La 2-a kompanio de ŝipo kaj ponto de iu inĝeniera trupo de ĈPLA starigis pramejon ĉe danĝera

loko de la Flava Rivero por transporti konstruajn materialojn.

Ĉi tie, la supra parto de la riverlito larĝas kelkcent metrojn kaj malsupre estas ravino larĝa dekojn da metroj. La rivero alfluas desupre kvazaŭ falante kaj levas altegajn ondojn. Tiun lokon la ŝipoj povas trapasi nur tirate trans la malprofundejoj.

Iun fruan matenon, la temperaturo falis ĝis pli ol 20 gradoj sub la nulo kaj al la pramejo subite venis eksterordinara glacia torento. Montsimilaj glaciaj amasoj alkuris malsupren kaj baldaŭ ŝtopis la ravinon.

En tiu tempo pramado fariĝis tute neebla. La komunika ponto interligita kun la flosanta kajo estis puŝata de glacia torento kaj estis en la danĝero esti detruota, forportota de la fluo. La kompania

estro Lej Venming ricevis ordonon gvidi la soldatojn al la pramejo por tiri surteren kaj sekurigi la ponton kaj kajon. Subite granda amaso da glacio venis kaj trarompis la glacian ŝtopaĵon en la ravino kaj abrupte malaltiĝis la akvonivelo. "Pum, pum, pum", rompiĝis kvin el la ses kabloj kiuj ligis la ponton kaj kajon. Se rompiĝus la lasta kablo, la ponto kaj kajo tuj estus forportitaj kaj falus en la ravinon frakasitaj.

En tiu kriza momento la komandantoj kaj soldatoj ripetade recitis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**". Lej Venming ordonis la soldatojn salti sur la ponton kaj li mem batalis sola sur la plej danĝera loko sur la flosanta kajo.

Por kunligi la rompitaĵajn kablojn, la soldato Liu Guohaj rapide rampis sur la kunigitan glaci-

Hakado de roko por konstrui vojon.



*Rikolto de legomo
akirita de ĈPLA-
anoj sur malfekun-
da monto*




amason por proksimiĝi al la rompitaĵoj kabloj, kiuj troviĝis dekelkajn metrojn fore de la ponto. Liu Guohaj persiste klopodis duonhoron sur la glacio kaj fine sukcesis rekunligi la kablojn. Sed, tuj post lia reveno al la ponto, puŝiĝis en la direkto al li granda glacibloko. "Atenton!" ekkriegis subplotonestro Ĝaŭ Huajĝu. Li plenforte depuŝis la glaciblokon per hokstango, kiu kurbiĝis sub premo kaj la glacibloko forglitis pretere sen akcidento.

Post batalo de unu tagnokto kontraŭ la glacia torento, la batalantoj de la 2-a kompanio venkis ĝin kaj sekurigis la ponton kaj kajon.

KONKERO DE GOBIO

La komandantoj kaj batalantoj de la 6-a kompanio de iu inĝeniera trupo de ĈPLA venis al la vasta Gobio por plenumi iun malfacilan konstruan taskon.

La granda vastejo ne havas randon videblan kaj ĉie kuŝas ovalaj ŝtonetoj. La sablo ofte kovras la ĉielon dum ventado. Ĉi tie, en la tago, la suno varmege bakas; en la nokto, abrupte falas la temperaturo, kaj oni sentas sin kvazaŭ en glacia kelo. Apenaŭ la batalantoj starigis tendojn, subite furioza vento faligis ilin. Antaŭ tiu malfacila stato,



Nova ponto en konstruado

la batalantoj diris brave: “Sperti malfacilojn pro revolucio estas plej feliĉe en la koro, kaj ni sentas dolĉon, eĉ se ni spertos ankoraŭ pli grandajn laciĝon kaj malfacilojn.”

Dum enverŝo de betono, 8 fingroj de la komunisto Li Daĝi, estro de la 10-a subplotono, estis brulvunditaj de cemento kaj akra doloro turmentis lin. Kamaradoj admonis lin ripozi, sed li ne konsentis kaj diris al la aliaj: “Nia laboro estas mikso de cemento kun sablo, sed nia idealo estas efektivigo de komunismo. Por la revolucio mi eĉ volontos oferi mian vivon, kion signifas la vundo de kelkaj fingroj?”

Por longe loĝi sur Gobio, la batalantoj de la 6-a kompanio uzis intertempojn dum intensa konstruado por kulturi teron kaj fari aliajn flankajn

okupojn. En frua printempo, la temperaturo sur Gobio restis ankoraŭ pli ol 30 gradoj sub la nulo. Malgraŭ la rigora frosto, la komandantoj kaj batalantoj peneme laboris pli ol duonmonaton kaj kreis legomkampojn sur Gobio kiu dormis dum jarmiloj.

Por venki altan temperaturon kaj sablan venton, ili faris el argilo kaj sablo pli ol dek mil “vazojn” kaj kovris per ili renversitaj la ĝermojn. Ili faris pli ol cent mil adobojn por masoni kontraŭventajn murojn ĉirkaŭ la legomkampoj. Dank’ al ilia penema batalo de kelkaj monatoj aperis en Gobio ozao kun verdaj legomoj. En la pasinta jaro, la kompanio rikoltis pli ol 36,500 kilogramojn da kukurbo, terpomo, tomato kaj aliaj legomoj, per kiuj ĝi atingis ĝenerale memsufiĉon je legomoj.

Varma Bonvenigo al Honorindaj Rumanaj Gastoj

Popolanoj de nia ĉefurbo varme bonvenigas la honorindajn rumanajn gastojn.





Akompanate de kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj, kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaĵ kamaradoj rondiras sur la aerodromo por intervidiĝi kun la amasoj.

正义斗争!

TRAIASCĂ PRIETENIA DINTRE POPORUL CHINEZ ȘI POP





Diversnaciaj polanoj bonvenigas la honorindajn gastojn kantante kaj dancante.

Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj la aliaj membroj de la delegacio vizitas la dependan fabrikon de Kinghua-universitato.





Rumanaj kamaradoj vizitas la Ĝeneralan Petrol-kemian Fabrikon de Pekino.

Akompanate de kamarado Ĝou Enlaj kaj aliaj, kamarado Ceausescu kaj aliaj rumanaj gastoj pri-rigardas la Nankinan Pontegon super Jangzi-rivero.







Kamarado Ceausescu faras amikan paroladon en bonveniga kunveno okazigita de Giangnan-ŝipkonstruejo de Ŝanhajo.

Sur tritika kampo de Malu-popolkomunumo en antaŭurbo de Ŝanhajo





Semo de Amikeca



Komunumanoj de la Ĉina-Rumana Popola Komunumo en Pekino zorge flegas junajn plantojn de maizo "Amikeco", specio el Rumanio.

LA amikaj rilatoj longe ekzistantaj inter la Rumana-Ĉina Amikeca Agrikultura Kooperativo en Ialomita-gubernio de Rumanio kaj la Lugoŭkiaŭ-a Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo en Pekino fariĝas ĉiam pli intimaj kun la disvolviĝo de la amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj Rumanio.

La Rumana-Ĉina Amikeca Agrikultura Kooperativo situas sur Baragan-ebenejo je ĉ. 90 kilometroj oriente de Bukaresto. Ĝi havas pli ol 5,000 hektarojn da tero kaj 1,500 membro-familiojn kun pli ol 5,000 homoj. Ĝi estas unu el la avangardaj agrikulturaj kooperativoj en tiu gubernio.

La Rumana-Ĉina Amikeca Agrikultura Kooperativo estas simbolo de la amikeco inter la popoloj de Rumanio kaj Ĉinio. Ĉiu ĉina kamarado vizitanta Rumanion nepre vizitas tiun agrikulturan kooperativon kaj transdonas al la rumana amikoj la korajn salutojn de la Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo; kaj la rumana mastroj siavice ĉiufoje petas la gastojn transdoni iliajn bondezirojn al la membroj de la Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo. La varma gastamo de la kadroj kaj membroj de la kooperativo donis profundan impreson al ĉiu ĉina vizitanto.

Iutage en printempo de la kuranta jaro, la ĉina laborista delegacio invitive ĉeestanta la Kongreson de la Ĝenerala Sindikata Federacio de Rumanio vizitis la kooperativon. Tie ĝi ricevis tre varman kaj amikan akcepton. Kamarado Gheorghe Ghita, prezidanto de la kooperativo, petis la delegacion transdoni korajn bondezirojn de la koo-

perativanoj al ĉiuj membroj de la Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo kaj krome transporti 40 kilogramojn da maiza semo al la popola komunumo.

Kamarado Ghita diris: "Tiu semo estas de bona specio nove elkulturita de nia kooperativo. Bonvolu ilin porti al la Lugoŭkiaŭ-a Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo. Ili povos atingi ĝin antaŭ la tempo por semado en tiu ĉi jaro. Ni kredas, ke ili enradikiĝos, ĝermos, kreskos kaj fruktos en la tero de frata Ĉinio." Kaj li diris emocie je la fino: "Hodiaŭ ni nomas la maizan semon 'Amikeco'!"

Ĉiu grajno de la maizo "Amikeco" entenas profundan amikecon de la membroj de la Rumana-Ĉina Amikeca Kooperativo al la ĉina popolo.

La nova semo estas elkulturita de agronomia teknikisto kamarado Anghel kun la helpo de aliaj kamaradoj de la kooperativo. Kiam Anghel tion faris, dekomence li deziris elkulturi altproduktan bonan semon de maizo por donaci ĝin al la Lugoŭkiaŭ-a Ĉina-Rumana Amikeca Popola Komunumo de Pekino. Nun lia deziro realiĝis. Kiel li ĝojis pro tio!

En la Rumana-Ĉina Amikeca Agrikultura Kooperativo, en la tuta Rumanio, oni povas trovi multajn amikojn similajn al la agronomia teknikisto Anghel, kiuj sopiras al siaj amikoj en la malproksima Ĉinio kaj ĉiam klopodas fari sian kontribuon al la amikeco inter la rumana kaj ĉina popoloj.

He Dezaŭ —

Soldato de la Ruĝa Armeo

KAMARADO He Dezaŭ naskiĝis en familio de malriĉkamarano en Hingguo-gubernio, Gianghi-provinco. En 1932, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, li surpaŝis la revolucion vojon. En longtempa klasbatalo li ekkonis la profundan veron: Revolucio estas senĉesa batalado!

Post la Liberiĝo de la tuta lando, He Dezaŭ

estis sendita al iu sanatorio de ĈPLA por labori tie kiel ĝia direktoro. Post nelonge, en la sanatorion blovis la hereza vento de la burĝaro senbride levita de la renegato Liu Ŝaŭki. En iu mallonga periodo estis prezentitaj al He Dezaŭ por aprobi plurajn planojn pri aĉeto de iuj luksaj ekipaĵoj. Leginte tiujn petskribojn, He Dezaŭ tre maltrankviliĝis. La planoj montris, ke iuj el la kamaradoj estas koroditaj de la burĝara ideologio.



Kamarado He Dezaŭ

Li kaj aliaj membroj de la partia komitato gvidis la personaron de la sanatorio al ripetada studo de la instruo de Prezidanto Maŭ “ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema lukto”. Leviĝis en la sanatorio kritikado al burĝara ideologio kaj vekis ĉe ĉiuj kamaradoj abomenon kaj malamon kontraŭ la burĝara kuracmaniero. De tiam, ili aranĝis la vivon de la pacientoj, elirante el la vidpunkto de stimulado de batalvolo. Ili organizis ilin por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, disvolvi revoluciajn literaturajn kaj artajn aktivadojn, viziti ekspozicion pri klasa eduko, aŭskulti rakontojn de laboristoj, malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj pri historio de iliaj fabrikoj kaj vilaĝoj kaj helpi proksimajn vilaĝojn en rikoltado kaj semado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili kondukis la pacientojn al proksimaj brigadoj por kritiki kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj la krimojn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, kiu intencis restaŭri kapitalismon, tiel ke la pacientoj-aviadistoj ne nur plibonigis sian sanon, sed ankaŭ altigis sian konscion pri klasa kaj linia batalo.

Flegistino Ma estas filino de malriĉkamarano. Kiam ŝi ĵus venis al la sanatorio, ŝi vestis sin de la kapo ĝis la piedo tute kiel kampara knabino. Por helpi najbarajn vilaĝojn ŝi plugis kampojn, vektportis sterkon kaj faris ĉion senelekte. Sed post iom da tempo, ŝi rigardis “malmoda” veston el kruda ŝtofo alsenditan de ŝia hejmo. Ŝi plurfoje rekudris ĝin, sed nekontentige, kaj fine metis ĝin simple en la fundon de kesto.

Ĉe juna Ma, He Dezaŭ vidis korodon de burĝara ideologio al junuloj. Li opiniis, ke ŝati aŭ malŝati iun veston, tio estas bagatelo, sed el tio montriĝis ŝanĝiĝo de la penso de juna Ma. He Dezaŭ rememorigis la unua la malfeliĉan vivon en la



Kamarado He Dezaŭ interparolas kun komunumanoj dum laborpaŭzo.

malnova socio kaj rakontis la revolucionan tradicion. Tio donis bonan instruon al junuloj kaj juna Ma ekvestis sin per la alsendita vesto sen plua reformo. Ŝi diligente lernis, konsciencelaboris kaj en sinsekvaj jaroj estis elektita kiel flegistino kun kvin bonoj.

La Granda Proletara Kultura Revolucio puŝis la maljunan estintan soldaton de la Ruĝa Armeo ankoraŭ pli brile disradii sian revolucionan spiriton. Al ĉiu okazintaĵo en la sanatorio li serioze faris klasan analizon, por ke li mem kaj la ĉirkaŭaj kamaradoj povu firme iri laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Iu aviadisto perdis al si bonan funkcion de ekvilibriĝo kaj la kuracisto konsilis al li “ĉesigon de flugado”. Pro tio la aviadisto venis al He Dezaŭ kaj diris: “Kamarado direktoro, mi estis bovoknabo kaj dank’ al la eduko de Prezidanto Maŭ



He Dezaŭ parolas en kunveno pri aplikado de Maŭzedongpenso.

mi kreskis kiel aviadisto. En ĉiu okazo, mi ja neniel povas retiriĝi el la batalantaj vicoj!”

Por resanigi lin, He Dezaŭ faris kuracprojekton kaj organizis kuracan grupon sub sia gvido. Antaŭ ĉio He Dezaŭ studis kune kun la aviadisto la verkon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* por firmigi lian fidon pri reakiro de la bona funkcio de ekvilibriĝo. Poste He Dezaŭ kaj la kamaradoj de la kuraca grupo ripetade studis metodojn por rebonigi lian ekvilibriĝan funkcion.

Dank’ al helpo de He Dezaŭ, la aviadisto meminciate kunagis kun kuracaj laborantoj kaj faris obstine tre lacigan ekzercadon, kaj fine restariĝis lia ekvilibriĝa funkcio. Kaj la paciento revenis al sia batalposteno de defendo de la patrolanda teritoria aero.

He Dezaŭ partoprenis en la revolucio jam pli ol 30 jarojn, sed li ĉiam konservas la karakteron de ordinara soldato.

Iun tagon, fininte sian intensan labortagon, He Dezaŭ revenis en sian ĉambron kaj vidis, ke aliaj portis en lian ĉambron risortan liton. “Tio estas por pacientoj. Kial oni ĝin sendis al mi?” Li tuj petis la kamaradojn helpi lin por reporti ĝin.

Iuj diris al li: “Vi estas maljuna kaj antaŭe

vundita en milito. Nun ni havas pli bonajn kondiĉojn. En kio gravas uzo de unu risorta lito?”

He Dezaŭ respondis serioze: “Ju pli oni estas maljuna kamarado, des pli oni devas esti modesta kaj malakcepti privilegion. Nun vi portis al mi risortan liton, tio pruvas, ke vi ankoraŭ ne traktas min kiel ordinaran soldaton, ordinaran komuniston kaj ordinaran laborulon.”

Uzi risortan liton, tio estas evidente bagatelo. Kial He Dezaŭ donis al ĝi grandan atenton? Tion li klarigis en raportkunveno pri apliko de Maŭzedongpenso: “En revolucio oni ne devas montri pretendon ‘per la pasinteco’; montri ‘pretendon per la pasinteco’ ja estas elmontriĝo de burĝara egoismo kaj postulo pri honoro, pozicio kaj favoro de la Partio kaj popolo. Oni ne devas neglekti tiujn bagatelojn; la burĝaro ofte komencas korodii nian animon ĝuste de tiuj ‘bagateloj’. La revolucia spirito neniam velkiĝu al ni komunistoj kaj ni devas serioze trakti ĉiun ‘bagatelon’.”

Ripetade studinte la novan statuton de la Partio aprobitan de la Naŭa Tutlanda Kongreso, He Dezaŭ starigis por si ankoraŭ pli rigoran normon: strikte sekvi Prezidanton Maŭ en revolucio kaj senĉese strebi al nova alteco en penso, nova energio en agado kaj novaj atingoj en laboro.

TANG BAJ:

Cervopaŝta Knabino

LA cervopaŝta knabino Vang Hiuhian estis antaŭe lernantino de la bestobreda fakulo de Agromia Lernejo de Ĝanggiakoŭ, Hebej-provinco. En somero de 1968 ŝi firme respondis al la alvoko de Prezidanto Maŭ iri la vojon de kombiniĝo kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Post ripetata peto oni konsentis al ŝi labori en la Dua Cer-

vobredejo de Liaŭjuan, Gilin-provinco.

Baldaŭ komenciĝos ŝia nova vivo, kun bona humoro ŝi iris hejmen por vidi sian patrinon. Kiam ŝi pretis forlasi la hejmon, la patrino alfiksis sur ŝia brusto insignon kun la portreto de Prezidanto Maŭ kaj rakontis al ŝi el la fundo de la koro, kiel ŝiaj du pli-aĝaj fratoj armeaniĝis:

Vang Hiuhian paŝtas cervojn.



Estis en la jaro 1943, kiam la japanaj agresantoj estis tretantaj la belan landon de Ĉinio. La japana imperiismo praktikis la politikon forbruligi, forbuĉi kaj prirabi komplete. Multaj ĉinoj perdis siajn familianojn kaj hejmojn. Iutage subite venis malbona informo: viaj geavoj kaj onklo estis mortigitaj sub la bombado de la japanaj rabistaj aeroplanoj. Nelonge poste mi sendis vian plejaĝan fraton al unu el la trupoj gvidataj de Prezidanto Maŭ.

Post la Liberiĝo la usona imperiismo lanĉis la kriman agresan militon kontraŭ Koreio en la jaro 1950. Kaj la milita fajro etendiĝis al Jalu-rivero, mi sendis vian trian fraton al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.

Aŭdinte tion, Hiuhian diris emocie: “Panjo, estu trankvila, mi nepre agos same kiel miaj fratoj kaj hardos min en malfacilaj cirkonstancoj.” La diro tre plaĉis al la patrino, sur kies vizaĝo aperis kontenta rideto.

Antaŭtagmeze de la 2-a de aŭgusto 1968, Vang Hiuhian venis al la cervobredejo en la fora montvilaĝo kaj posttagmeze de la sama tago ŝi jam iris sur la montoj kune kun la paŝtistoj por paŝti cervojn.

La 14-a de aŭgusto estas memorinda tago por ŝi, ĉar ŝi estis oficiale organizita en paŝtistan grupon, kiel la sola paŝtistino en la bredejo. Ĉiuj elkore ĝojas, ke ŝi estas modesta kaj afabla kaj tuj interrilatis intime kun la paŝtistoj. La paŝtistoj propramane faris por ŝi paŝtvipon kun ruĝa kvasto kaj kuraĝigis ŝin ĉiam marŝi laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Vespere ŝi sidis vide kontraŭ la paŝtvipo kaj tre longe ne povis kvietiĝi ŝia koro. Antaŭe sub la influo de la “lernado por fariĝi ŝtatoficisto” distrumpetita de la renegato Liu Ŝaŭki, la intelektaj junuloj laborantaj en la kamparo estis rigardataj kiel “homoj promesantaj nenion”. Nun por ke la proletara patrolando neniam ŝanĝu sian koloron, la laboristoj varme zorgas pri maturiĝo de intelektaj junuloj. Ŝi esprimis sian decidemon neniam disiĝi de laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Tiam ŝi elprenis sian poŝtranĉilon kaj ĉizis kvar vortojn sur la tenilo de la vipo: “revoluciado ĝis la fino”.

Iutage ŝi deĵoris en la oficejo de la bredejo. La bredda grupo ĵus pelis la cervojn al paŝtejo. Post nelonge la ĉielo malsereniĝis kaj subite estis dense kovrata de nigra nubo kaj skuata de fulmotondroj. Kaj ekfalas hajlo. Tra la vitra fenestro ŝi vidis, ke terurite saltis la cervoj sur la kontraŭa monto. La maljuna paŝtisto Vang Ŝouŝan

ekkriis: “Domaĝe! La grego tre probable estos dispelita.” Antaŭ ol li finis sian parolon, li jam kuris el la ĉambro kaj kelkaj aliaj paŝtistoj tuj lin sekvis urĝe. Vidante la kuregantajn laboristojn, ŝi estis tre kortuŝita kaj ŝi ankaŭ postkuris ilin. Kaj ŝi kuris ĵus el la domo, ŝi falis en koton. Sed tion ŝi ne povis prizorgi kaj rapidis urĝeme al la montpiedo, tiam ŝi jam anhelis. La laboristoj sur la monto kriis al ŝi: “Reiru, Hiuhian! Ni povos rekolekti la cervojn kaj peli ilin returnen.” Vang Hiuhian forviŝis al si la survizaĝan pluvakvon kaj daŭrigis sian kuradon supren al la monto, kie troviĝis la cervogrego. Fine ili pelis kune la cervojn al la stalo.

En tiu vespero, kiam ĉiuj jam dormis, ŝi ankoraŭ legis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj pripensis la okazaĵon en la tago. Kial la laboristoj sen ia ajn hezito kuris en la hajlo, dum ŝi agis malrapide nur post kiam la aliaj jam donis ekzemplon? Kaj ŝi konis, ke ŝi fakte ankoraŭ timas malfacilon kaj ke mankas al ŝi la nobla kvalito de varma amo al la posedaĵo de la ŝtato, kiun havas la laboristoj.

Cervoj estas viglaj kaj moviĝemaj bestoj. La paŝtistoj devas ĉiam ilin pelkunigi, alie iuj el ili povas facile forkuri de la amaso. En la komenco estis tre penige por Hiuhian paŝti ilin sur la montoj. Ŝi tamen diligente sin ekzercis en ascendo kaj descendo de la montoj. Ŝia persistemo tre ĝojigis la laboristojn, kiuj aktive ŝin helpis per siaj spertoj por ŝin lertigi, tiel ke ŝi tre rapide progresis.

De tiam, ĉu en varmega somero aŭ en rigora vintro kun frosta vento, ĉu en ŝtormaj noktoj aŭ en neĝado ŝtopanta la vojon, ŝi ĉiam kuris sur la altaj montoj kaj lasis siajn piedsignojn ĉie en la tuta paŝtejo kiel la cervoj...

Foje, dum paŝtado perdiĝis sep cervoj. Por ne kaŭzi perdon al la ŝtato, kune kun aliaj paŝtistoj Vang Hiuhian traserĉis la montojn. Ĉar la cervoj estas timemaj kaj, krome, la vetero estis tre varma, ili kaŝis sin en profundaj arbaroj. Estis jam la 2-a horo post la tagmezo. Ne preninte la tagmanĝon, ŝi estis laca kaj malsata. Ĉiu paŝo estis por ŝi sufiĉe malfacila. Tamen, ŝi kuraĝigis sin: “Persistu, persistado signifas venkon!” Ŝi daŭrigis la serĉadon en arbaro kun ligna stango en la mano. Subite montris sin cervo el inter la arboj. Hiuhian tute forgesis sian lacon kaj malsaton, tuj prezentis al ĝi pecon da sojfaba rekremento kaj junajn foliojn kaj allogis la cervon iom post iom proksimen al si kaj poste kondukis ĝin trinki ĉe fonto. Tiam la suno jam kliniĝis post la montojn. De malproksime sonis paŝtvipado



Lerno de metio de cervopaŝtado

de aliaj paŝtistoj. Ŝi rapide respondis per antaŭe konsentitaj signaloj. Tiel la serĉantoj iom post iom kolektiĝis kun retrovitaj cervoj kaj bonhumore pelis ilin returne. En tiu tago, Hiuhian kuris pli ol cent liojn sur la montoj, aperis sur la plandoj vezikoj pro frotado, kaj ŝiaj vestoj estis ŝiritaj de branĉoj. Tamen, ŝi estis tre kontenta, ĉar neniu el la cervoj estis perdita. Tio kompensis ŝian lacigon kaj penadon.

En printempo de 1969, kelkaj cervinoj abortis. Tio maltrankviligis Hiuhian kaj la aliajn paŝtistojn. Kune kun la paŝtistoj Hiuhian faris ĝeneralan sangekzamenon al centoj da cervinoj per scio kiun ŝi akiris en lernejo, fine trovis la kaŭzon de aborto kaj alprenis efikan kontraŭrimedon,

kiu sukcese preventis pluan aborton.

Ĉiujare en frua aŭtuno, la bredejo kolektas verdan furaĝon por la cervinoj dum ilia akuŝado. Sed pro longa konservado ofte okazas putriĝo. La laboristoj alprenis iajn kontraŭrimedojn, kiuj havas iom da efiko, sed ne povis tute solvi la problemon. Hiuhian pristudis la problemon kune kun la laboristoj. Post ripetada eksperimento, ili trovis rimedon kun bona rezulto. La laboristoj ĝoje laŭdis, ke Hiuhian aplikis sian lernitan scion jam en produkta praktiko.

De urbo al kamparo kaj de studentino al cervopaŝtistino, Vang Hiuhian multe ŝanĝiĝis en diversaj flankoj kaj senĉese marŝis antaŭen sur la vojo de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.


Vizito al Emerita Laboristo

Liu Zajhiang

ANTAŬ nelonge ni havis ŝancon viziti la emeritan laboriston Liu Zajhiang de la Pekina Lokomotiva kaj Vagona Fabriko "7-a Februaro".

La 68-jara maljunulo kaj lia edzino interparolis kun ni tre bonhumore. El iliaj paroloj ni informiĝis ke li laboris jam 44 jarojn de 1922 ĝis 1966 en la nomita fabriko, kiu antaŭe portis la nomon de Ĉanghindian-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko.

Kiu multe suferis en la malnova socio, plej bone konas la dolĉon de la nuntempo. Antaŭ la Liberiĝo, Liu Zajhiang laboris kun sia patro en la sama fabriko. Tiam sub la premado de imperiismo, feŭdismo kaj la burokrata kapitalismo, same kiel la aliaj laboristoj, ili vivis tre mizere kaj ne havis sufiĉan manĝon por ŝtopi sian stomakon kaj veston por ŝirmi sin de frosto, laboregante 12 horojn ĉiutage. La fremdlandaj kapitalistoj, kiuj administris la fabrikon, la ĉinaj reakciaj burokratoj kaj laborinspektistoj tute ne rigardis la laboristojn kiel homojn kaj laŭvole ilin batis aŭ insultis. Tamen, kie estas subpremo, tie estas kontraŭstaro. En la 7-a februaro 1923, sub la gvido de la Partio la laboristoj de tiu fabriko kaj la Pekino-Hankoŭ-a Fervojo lanĉis la lande faman ĝeneralan strikon. Liu Zajhiang partoprenis la strikon. Tiam li estis grupestro de laborista sindikato. Post la Liberiĝo, la laboristoj emancipiĝis kaj fariĝis mastroj de la lando sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Li havas varman amon por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj faris sian plejblon por lerni Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, spite al ĉiuj malfaciloj. Dank' al tio li multe levis sian klaskonscion kaj nelonge post la Liberiĝo aliĝis glorie al la Komunista Partio de Ĉinio. En la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, li ĉiam montris sian altan devkonscion kiel mastro, aktive edukis daŭrigantojn de la revolucia afero kaj sukcese efek-



Kamarado Liu Zajhiang

tivigis plurajn teknikajn renovigojn, kaj pro lia kontribuo al la socialisma konstruado de la patrolando, li multfoje estis elektita kiel avangarda produktanto.

Ni vidis en lia hejmo multajn memorigaĵojn al li donacitajn de ruĝaj gvardianoj. La mastro diris al ni, ke ĝuste kiam li emeritiĝis, komenciĝis arde la Granda Proletara Kultura Revolucio. Kaj li partoprenis aktive la revolucion kune kun aliaj



La tri generacioj de la familio de Liu Zajhiang

emeritaj laboristoj de la fabriko. Tiutempe, junaj ruĝaj gvardianoj de diversaj lokoj venis al Pekino por fari revolucion interkomunikiĝon. Al pasantaj ruĝaj gvardianoj, Liu Zajhiang ofte rakontis pri la bataloj dum la ĝenerala striko de 7-a februaro por kuraĝigi ilin en revoluciado. En 1968 Prezidanto Maŭ donis la instrukcion **“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”**, Liu Zajhiang kaj kelkaj maljunaj laboristoj partoprenis la proletaran edukon revolucion en iu gimnazio. En la lasta tempo, li kune kun membroj de la revolucia komitato de la fabriko ofte akceptis fremdlandajn gastojn, kiuj vizitis nian landon, kaj prezentis al ili la gloran revolucionan tradicion de la fabriko.

La vivo de la maljuna laboristo antaŭ kaj post la Liberiĝo montras fortan kontraston. En la tago kiam ni vizitis lin, li ĵus ricevis sian pension senditan de la fabriko. **“Kiel zorgas nin la Partio kaj Prezidanto Maŭ! En ĉiu monato la fabriko regule sendas al mi la pension,”** li diris al ni.

Laŭ la difino de nia registaro, ĉiu laboristo aŭ oficisto rajtas emeritiĝi, en la aĝo de 60 jaroj por viroj, de 50 kaj 55 jaroj por laboristinoj kaj oficistinoj respektive. La ŝtato pagas al emeritoj ĝis la morto 50%, 60% aŭ 70% de la origina salajro laŭ la laborjaroj.

Liu Zajhiang emeritiĝis en sia aĝo de 63 jaroj. Parolante pri tio li diris: **“Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, nia patrolando rapide ŝanĝis sian postrestintan fizionomion. Vidante la novajn atingojn sur niaj diversaj frontoj, mi ĉiam sentis en mi senfinan energion. Kvankam mi tiam estis 63-jara,**

tamen, mi sentis min sufiĉe forta por labori ankoraŭ plurajn jarojn. Sed miaj superuloj kaj kolegoj diris: **‘Tio estas zorgado de la Partio al la maljunaj laboristoj, por ke ili ĝuu siajn lastajn jarojn.’ Tiam mi estis tre kortuŝita.”** Li antaŭe estis tornisto de 7-a klaso kaj ricevis monate salajron de pli ol 90 juanoj. Nun li ricevas pension de 70% de sia origina salajro.

Liu Zajhiang havas profundan impreson pri la tute malsama vivo en la malnova kaj nova socioj. Montrante la helajn kaj ordajn ĉambrojn li diris: **“Mi prenu la loĝejon kiel ekzemplon: Mi, miaj edzino kaj nepino okupas du ĉambrojn, krom la kuirrejon. La loĝkondiĉoj estas sufiĉe oportunaj. Por tio mi pagas ĉiumonate nur 4 juanojn, inkluzive akvon kaj elektran lumon. Tio okupas nur 4% de la enspezoj de mi kaj mia nepino. Tamen en la malnova socio, kiam mi laboris kiel metilernanto, multaj homoj interpretiĝis en malpura kaj kaduka ĉambro, kaj mi ne havis eĉ maton. Poste mi sukcesis lui ĉambron, tamen ĝi estis malhela kaj kaduka kaj en ĝi gutadis akvo dum pluvado.**

“Antaŭ la Liberiĝo ni neniam manĝis tritikan farunon aŭ rizon. Dum la invado de la japana imperiismo, la laboristoj manĝis tiel nomatan miksititan farunon faritan el kverksemo, maizo, sojfaba rekremento kaj aliaj nenomeblaj surogatoj. Kiam venis Kuomintango la prezroj ĉiutage altiĝis plurfoje. La monata enspezo sufiĉis nur por aĉeti dekelkajn kilogramojn da maizfaruno. Post la Liberiĝo ni ĉiutage povas manĝi tritikan farunon, rizon, fiŝon, viandon kun malalta prezo, kaj neniu familio sentas malsufiĉon en manĝado kaj vesto.”



Liu Šulan, la nepino de Liu Zajhiang.

La maljunulino daŭrigis: “Dum la jaroj post la Liberiĝo, la prezoj de greno, ŝtofo, oleo, salo, karbo, legomo estas ĉiam stabilaj. Mezqualita senbrana rizo kostas 0.30 juanon po kilogramo, legomoj nur kelkajn fenojn (centono de juano) po ĝino (duona kilogramo), porkviando 0.90 juanon po ĝino kaj viando de bovo aŭ ŝafo 0.70 juanon po ĝino. La vivo de laboruloj post la Liberiĝo tiel diferencas de tiu en la malnova socio, vere kvazaŭ la ĉielo de la tero!”

Parolante pri ekstraj elspezoj, Liu Zajhiang diris: “En la malnova Ĉinio la impostoj estis tre multaj kaj pezaj, tute nenombreblaj. Por trovi laboron en fabriko, la laboristoj devis prezenti donacaĵon al la laborinspektisto. Kaj krome, la laboristoj devis materie gratuli al li okaze de festoj aŭ novjaro por ke ilia laboro estu garantiata. Post la Liberiĝo ni ne pagas impostojn, male la ŝtato pagas por ni tute la kuracajn elspezojn kaj duonon de tio por niaj familianoj. La prezoj de medikamentoj jam kelkfoje reduktiĝis grandmezure kaj la medicinaj elspezoj ja estas malmultaj.

“Iun jaron mi suferis de grava pleŭrito, ke mi ne povis manĝi,” interrompis la edzino, “kaj resaniĝis post dumonata kuracado en hospitalo. Se tio okazus en la malnova socio, kion mi povus fari, krom atendi la alvenon de la morto!?! Kiel oni povus imagi pri emeritiĝo kun pensio kaj eĉ senpaga

kuraciĝo dum maljunaj jaroj, kiel Zajhiang nun ĝuas!”

“Tamen, kio konstante maltrankviligis la laboristojn en la malnova socio, estis la timo al perdo de laboro, al perdo de vivrimedo,” daŭrigis Liu Zajhiang, “nun ni ne plu havas zorgon pri tio. Post la Liberiĝo, la popolanoj havas stabilajn laboron kaj vivon. Prenu mian familion kiel ekzemplon, mia filo estas nun teknikisto post finstudo en mezgrada teknika lernejo kaj lia edzino laboras en banko. El miaj 4 filinoj, unu laboras kiel fervoja laboristino, unu kiel telegrafistino kaj unu kiel teksistino, kaj mia tria filino laboras en terkulturejo en antaŭurbo de Pekino. Mi havas ankaŭ nepinon, kiu venis al fabriko post diplomiĝo en la lernejo en 1966 kaj nun estas duagrada tornistino. Estis neimagebla en la malnova socio, ke tiel multaj personoj en unu laborista familio havas sian laboron.”

La maljuna laboristo, kiu vivis en la du malsamaj socioj, plej bone scias, kiel pasigi siajn lastajn jarojn. Li diris, ke en lia fabriko estas pli ol kvincent emeritaj laboristoj, kiuj ĝuas feliĉajn lastajn jarojn kiel li. Ĉe la fino de sia rakonto Liu Zajhiang diris signifplene: “Ĉion, kion ni laboruloj havas nun, ni dankas al la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Mi nepre edukos miajn posteulojn, ke ili bone konservu la laboreman kaj bravan virtojn de laboristoj.”

Sinsekvaj Riĉaj Rikoltoj de Kotonono en Nia Lando

NIA lando havas historion de pli ol 1,300 jaroj en kulturado de kotonono. Sed, en la malnova socio pro la ekspluatado, rabado kaj detruado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, ne povis disvolviĝi la kulturado de kotonono, same kiel tiu de aliaj agrikulturaj plantoj. En 1948, la jaro antaŭ la Liberiĝo de la tuta lando, la totala produktokvanto de kotonono egalas al tiu en 1919.

Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ la vastaj amasoj de kamparanoj suriris, paŝon post paŝo, la vojon de socialisma kolektivigo. Ili efektivigis serion da principoj kaj politikoj formulitaj de Prezidanto Maŭ pri disvolvo de la socialisma agrikulturo, kaj dank' al tio la kotona produkto ricevis relative rapidan disvolviĝon. En 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio por socialisma konstruado, la totala produktokvanto de kotonono 3.5-oble plialtiĝis ol tiu en 1949. Precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la kotonprodukto akiris ankoraŭ pli grandan kreskon. Dank' al la sinsekvaj riĉaj rikoltoj de kotonono de 1966 ĝis 1970, la totala kaj pomua produktokvanto de nia lando superis la plej altan nivelon de la historio.

En la lastaj kelkaj jaroj, la pomua* produktokvanto de sensemigita kotonono de granda nombro da gubernioj, komunumoj, brigadoj ambaŭborde de Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero, kie estas ĉefa regiono de kulturo de kotonono, jam superis 100 ĝinojn, la plej altan normon difinitan en la "Programo por Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando". En 1970, en du trionoj de la gubernioj de la tuta lando, kies pomua produktokvanto de sensemigita kotonono atingis 100 ĝinojn, ankaŭ tiu de greno superis la normon difinitan en la programo. Kaj la antaŭurbo de Ŝanhajo kaj Ĝegiang-provinco

de nia lando fariĝis modeloj de pomua produktokvanto de pli ol 100 ĝinoj da sensemigita kotonono sur granda areo. Ankaŭ la pomua produktokvanto de greno en tiuj du regionoj superis la normon de 800 ĝinoj difinitan en la programo.

La Granda Proletara Kultura Revolucio stimulis la revolucian entuziasmon de la vastaj amasoj de komunumanoj, tiel ke ili akiris multajn novajn atingojn. En frosta kaj malfekunda regiono norde de la antikva Granda Muro, kie la senprujna periodo estas mallonga, ĉe la randoj de la grandaj dezertoj en la Nordokcidento, sur montoj altaj je pli ol 1,000 metroj super la mara nivelo, en malaltaj teroj, kie ofte okazas sekeco kaj akvostagno kaj en regionoj de salalkala kaj ruĝa grundo aperis granda nombro da avangardaj komunumoj kaj brigadoj, kiuj akiris altan produkton tiel en greno kiel en kotonono. Multaj lokoj, kiuj antaŭe ne kulturis kotononon, nun kulturis kotononon kaj tiaj lokoj ankoraŭ vastiĝas senĉese.

La riĉaj rikoltoj de kotonono en sinsekvaj jaroj kreis tre favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de la kotona ŝpinteksa industrio de nia lando.

Jangliuhjue-brigado de Binhian-gubernio, Ŝandong-provinco estas fame konata pro alta produkto de greno kaj kotonono. Ĝi situas ĉe malsupra parto de la Flava Rivero kaj havas malfekundan, salalkalan kaj malaltan teron, kiu ofte suferas de sekeco. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la komunumanoj profunde disvolvis amasan movadon de lerno de Daĝaj. Prenante heroojn en la brila "tri popularaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ kiel ekzemplojn, ili tutkore kulturis kotononon por la revolucio, kombinis sian ĝisĉielan revolucian energion kun serioza scienca spirito, praktikis ĝeneralan irigaciadon kaj zorgeman kulturadon tiel ke


ili akiris riĉajn rikoltojn de greno kaj kotono en pluraj sinsekvaj jaroj. En 1970, ĝi pomue rikoltis 160 ĝinojn da sensemigita kotono kaj 1,220 ĝinojn da greno.

En la amasa movado de lerno de Daĝaj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, komunumanoj kaj revoluciaj kadroj de la kotonproduktaj regionoj disvolvis la revolucionan spiriton de **“sinapogo sur propraj fortoj”** kaj **“penema lukto en malfaciloj”**, energie entreprenis agrikulturan fundamentan konstruon, kiu multe grandigis la rezistan povon kontraŭ naturaj katastrofoj kaj kreis kondiĉojn por pliprodukto de kotono. En la lastaj jaroj en kotonproduktaj regionoj atakitaj de seriozaj naturaj katastrofoj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj batalis kontraŭ inundo kaj hajlo kaj efektivigis neredukton de produkto je okazo de granda katastrofo kaj riĉan rikolton je okazo de malgranda katastrofo. La

Nordo de nia lando estas malnova kotonprodukta regiono. De la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio en tiu regiono, oni multe faris agrikulturan fundamentan konstruadon kaj reformis kulturan sistemon, tiel ke la totala produktokvanto de kotono en 1970 pliiĝis je 16% ol en 1969 kaj la pomua je 20%.

Hualin-brigado de Giange-gubernio de Siĉuan-provinco en la Sudokcidento de nia lando situas en Gianmen-montaro alta je pli ol 1,000 metroj super la mara nivelo. En la pasinteco, neniam oni kulturis kotonon tie, kaj krome tre malalta estis la grenprodukto. En la lastaj pli ol dek jaroj, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj komunumanoj pene batalis kontraŭ la malriĉa montaro por konstrui kampojn de stabila altprodukto de kotono. Ili aldonis fekundan tertavolon al malgrasaj kampoj kaj reformis flavan gluecan grundon.

Komunumanoj de Jangliuhjue-brigado, Binhian, Ŝandong, kolektas kotonon.





Batalantoj de la armea kultura distrikto de Kujtun de la Hingianga Produkta kaj Konstrua Korpuso sunumas kotonon nove rikoltitan.

Dank' al ilia persista laboro ili fine akiris riĉan rikolton de greno, koton kaj oleplantoj. La meznombra pomua produktokvanto de sensemigita koton en la periodo de 1966 ĝis 1970 atingis 158 ĝinojn, je 15% plimultiĝis ol en 1965 la jaro antaŭ la granda kultura revolucio kaj la totala produktokvanto pliiĝis je 61.8%. En la pasinta jaro, la pomua produktokvanto de greno estis 866 ĝinoj kaj tiu de sensemigita koton estis 206 ĝinoj.

La vastaj amasoj en kotonproduktaj regionoj de nia lando serioze plenumas la "Okpuktan Ĉarton" de agrikulturo, efektivas scienca kulturadon de koton kaj tiel akcelas ĝian pliprodukton. En multaj lokoj stariĝis grupoj de scienca esplorado partoprenitaj de kadroj, veteranaj kamparanoj kaj teknikistoj, kiuj trovis certajn leĝojn en altprodukto de koton kaj kulturis nombron da lokaj agrikulturaj sciencoteknikaj laborantoj. La malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Jangŝuvanzi-komunumo de Liaŭning-provinco norde de la Granda Muro energie klopodis por terkulturi laŭ scienca maniero en la lastaj jaroj. La komunumo kulturis pli ol 700 agrikulturajn teknikajn laborantojn por esplori la vojon al altprodukto de greno kaj koton. Konsiderante la mallongecon de senprujna periodo de la loko, ili aplikis rimedojn

kontraŭ-prujnajn kaj semis kotonon plifruue je ĉirkaŭ 15 tagoj. Dank' al tio solviĝis la kontraŭdiro inter la longeco de kreska periodo de koton kaj la mallongeco de senprujna periodo. Ili ankorau faris sciencajn eksperimentojn pri alterna kultivo, intermiksa kultivo de greno kun koton, plantidprotektado, sterkado, forigo de superfluaĵoj, ekstermo de fiinsektoj k.a., kio akcelis la altprodukton de koton. Ekzemple, antaŭe oni kulturis kotonon sur ebenaj kampoj kaj grenon sur malpli bonaj kampoj. Nun ili laŭplane faras alternan kultivon de greno kaj koton, kulturis kotonon sur malfekundaj aŭ ŝtuparaj kampoj, kaj krome ili bone faras plugadon por konservi humidecon de grundo, aplikas plimulte fekajsterkon, konvene pliiĝas la plantojn por multigi fruktojn kaj produkton. En sinsekvaj jaroj, la pomua produktokvanto de sensemigita koton de tiu komunumo superis la normon de 100 ĝinoj difinitan en la "Programo por Agrikultura Disvolviĝo de la Tuta Lando" kaj grand-skala pliprodukto estis akirita ankaŭ en kulturado de greno.

Nun la vastaj amasoj de komunumanoj de kotonproduktaj regionoj de nia lando intensigas sian zorgadon de la kotonkampoj, kreante kondiĉojn por akiri riĉan rikolton en 1971.

LIN VEN:


Dokumenta Filmo

“la Irigacia Kanalo Ruĝa Flago”

*Tra la montaro Tajhang, laŭ hakita vojo,
Alkondukiĝas akvo de Ĝanghe-rivero.
Linhian-a la popolo kun heroa volo
Reformon entreprenas al la granda tero.*

.....

*La kanalo “Ruĝa Flago” kondukas la
akvon de la rivero Ĝanghe al Linhian.*




Kun la supra kanto aperis antaŭ niaj okuloj la irigacia kanalo “Ruĝa Flago”. Tiu granda dokumenta filmo estas produktita de la Centra Studio de Novajaj kaj Dokumentaj Filmoj de nia lando. Vivece kaj fidele ĝi registris la bravan faron de la popolo de Linhian-gubernio de Henan-provinco, kiu, kun la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luk-tado en malfaciloj, batalis 10 jarojn sur altaj kaj krutaj rokmu-roj de Tajhang-montaro kaj kons-truis artefaritan “ĉielan riveron” kun longeco de 1,500 kilometroj — la irigacian kanalon “Ruĝa Fla-go”, per hakado de 1,250 montoj, traborado de 134 tuneloj, fosado kaj masonado de 16,400,000 kub-metroj da tero kaj ŝtonoj.

Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**akvoutiligo estas aorto de agrikulturo**”, la popolo de Linhian-gubernio, kiu kuraĝas pensi kaj agi, en 1960 decidis haki montojn kaj alkon-duki akvon de Ĝanghe-rivero en Pingŝun-gubernio de Ŝanhi-provinco al Linhian-gubernio. En tiu tempo, ĉe la konstruejoj troviĝis nek domoj nek vojoj, kaj multaj estis la malfaci-loj. Sed ĉiuj popolanoj de Linhian armitaj per Maŭzedongpenso estas herooj. Kun la spirito de Daĝaj, ili batalis kontraŭ la naturo kaj klasaj malamikoj, sukcesis konstrui finfine la irigacian kanalon kaj ĝiajn kompletigajn branĉojn kaj akvo-konservejojn, formante jenan bildon:

*Kanalo serpentumas tra l' montaro,
Torentas ĉie fluo de kristalo.
Sekeco kaj inundo ne damaĝas,
Kaj riĉrikolton vidas ĉiu jaro.*

La filmo bone prezentas al ni la heroojn timantajn nek al malfaciloj nek al morto, grandnombre aperintajn sur la konstruejoj. Por forigi danĝerajn ŝtonojn pendantajn, kompartiano Ĵen Jangĉeng pene luktis ĉe kruta rokmuro pendante de ŝnurego alte en aero. Dum fosado de la tunelo Aŭroro, aperis en ĝi defalo de tero, kompartiano Vang Ŝicun brave iris en la tunelon por venki la danĝeron. La proletara revolucia spirito de la herooj brile disradias je forigo de ĉiu danĝera ŝtono, starigo de ĉiu apoga fosto kaj dehako de ĉiu malmola rokpeco.


La animskvaj scenoj en la dokumenta filmo montras la neelĉerpeblajn fortojn kaj saĝon de la popolo de Linhian. Per unu jaro kaj 4 monatoj, ĝi traboris la tunelon Aŭroro tra malmolaj rokoj de Luĝaj-monto. En nur 150 tagoj ĝi sukcesis konstrui Duofeng-akvedukton, kiun burĝaraj "specialistoj" kaj "aŭtoritatuloj" opiniis nekonstruebla por ĝi. Kaj en nur 56 tagoj, la heroo popolo de Linhian jam finkonstruis la ponton Aŭroro, sen uzo de ferbetono kaj modernaj maŝinoj. La ponto longas 550 metrojn, altas 16 metrojn kaj larĝas 4.5 metrojn — ĝi ja povas esti nomata giganta konstruaĵo. La popolo de Linhian kuraĝis entrepreni aferon, neniam faritan de la antaŭuloj. Ili kombinis sian revolucion entuziasmon kun scienca sinteno kaj deklaris, ke ili konstruos ponton "sur kiu povas iri veturiloj, tra kiu povas flui kanala akvo kaj sub kiu povas trakuri furioza superakvego". Iuj diris, ke pri tia ponto oni neniam



*La komunumanoj ne timas danĝeron
por dehaki rokojn de la monto.*

legis en historia libro. Sed popolanoj de Linhian-gubernio diris memfide: "Post la finkonstruo de la ponto, ni notu ĝin en libro, kaj tiam oni povos legi pri ĝi." Havante nek imiteblan ekzemplon nek ekipaĵojn, la popolanoj sukcesis konstrui la ponton, dank' al sia ruĝa koro fidela al Prezidanto

La transversa riverdigo kun malplena interno estas konstruaĵo sur la kanalo "Ruĝa Flago" speciale kreita de Linhian-aj malriĉk kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum konstruado de la kanalo.





Post la konstruo de la kanalo "Ruĝa Flago", la agrikulturo de Linhian akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj senprecedencajn en la historio.


Maŭ kaj la ĉiopovaj manoj. Profunde impresas rigardantojn la kortuŝaj scenoj pri la tago de la inaŭguro de la irigacia kanalo "Ruĝa Flago" sur la ekrano. Kiam la popolanoj de Linhian-gubernio, kiuj multe suferis mizerojn en la malnova socio,

vidas propraokule la altorentantan akvon de Ĝanghe-rivero, ili ekkriadis kaj saltadis de ĝojo kun larmoj en la okuloj. La bruado de la torento kaj la ĝojkrio de la amasoj "Vivu Prezidanto Maŭ!" longe ŝvebadas en la giganta montaro Tajhang.

Riĉa rikolto de tritiko en la irigacia regiono de la kanalo "Ruĝa Flago"




La Printempa Foiro de Ĉinaj Eksportaj Komercaĵoj en 1971



Vjetnamaj amikoj rigardas precizan ilmaŝinon.





Albanaj kamaradoj rigardas konstruan modelon de Daĝaj-brigado.



Svedaj komercistoj negocas kun laborantoj de la ĉina negoca grupo.





Dum la foiro, japanaj amikoj vizitas Ŝagiaŭ-komunumon de Fogang-gubernio, Guang-dong por rigardi freŝakvajn fiŝojn de ĝi breditajn.

Amikoj el Ekvadora Gvineo rigardas la modelojn kaj fotojn pri akvout iligaj konstruoj de Dongguan-gubernio de Guangdong-provinco.

Zambiaj amikoj rigardas traktoron fabrikitan en Tiangin.







Dank' al la senĉesa disvolviĝo de la agrikultura kaj rilataj flankokupaj produktoj de Ĉinio, abundaj eksportaj komercaĵoj estas liveritaj al la foiro. Aŭstralia komercisto mendas mangaĵojn.

Ĉilia amiko, kiu unuafoje partoprenas la foiron, rigardas komercaĵojn.



Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito

(En Esperanto)

ENHAVO

Revolucioj kaj Revoluciaj Militoj Estas Neeviteblaj en Klasa Socio
El la Pafilo Venas Ŝtatpotenco

Imperiismo kaj Ĉiuj Reakciuloj Estas Paperaj Tigroj

La Decida Faktoro de Venko kaj Malvenko en Milito Estas Homoj
sed Ne Objektoj

La Revolucia Milito Estas Milito de la Amasoj

Fondi Bazlokojn en la Kamparo kaj Sieĝi la Urbojn per la Kamparo

La Popola Liberiga Armeo Estas Armita Kolektivo Plenumanta
Revoluciajn Politikajn Taskojn

La Strategio kaj Taktikoj de Popola Milito

Nia Ĉefa Metodo Estas Lerni Militi en Milito

50 pĝ. 10.3 × 7.5 cm. kun ruĝa plasta kovrilo

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

**Aĉetu ĝin ĉe la Libroservo de EPĈ, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
aŭ rekte ĉe ĝiaj diverslandaj perantoj.**

Ĝi estas eldonita ankaŭ en la lingvoj araba, bengala, birma, angla, franca, germana, haŭsa, hindia, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, persa, portugala, rusa, hispana, ŝahilia, tamila, taja, urdua kaj vjetnama. Aĉetu ĝin ĉe Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio aŭ rekte ĉe la diverslandaj librovendejoj.



La Hodiaŭa Paŝtejo de Vulkanmaŭdu

LA popola komunumo Vulkanmaŭdu de Ĥin-a Dekstra Antaŭa Flago de Ĝilin-provinco, kiu situas sur stepo sude de la Granda Hingan-montaro, estas paŝtejo abunda de ŝafoj.

En flora printempo ni vizitis la herbejon Talabaga de la brigado Akilangtu. Tie loĝas paŝtistoj de ses naciecoj, nome la mongola, manĉua, olunĉuna, huja, hana kaj dahura, kiuj kunvivas solidare kvazaŭ veraj gefratoj. Per la forto de sia kolektivo ili ŝanĝis la fizionomion de la paŝtejo. En la lastaj dekelkaj jaroj ili fosis 124 simplajn putojn kaj multajn putojn funkciigajn per elektraj pumpiloj sur la senakva stepo. La klara akvo el ili fluas tra tiu areo de pli ol 250 kvadrataj kilometroj kaj faris ĝin paŝtejo riĉa je akvo kaj herboj.

Nun la tuta komunumo havas pli ol 230,000 ĉevalojn, bovojn kaj ŝafojn, duoble tiom kiom antaŭ la komunumigo.

Ĉijare, en la sezono de akuŝado de ŝafinoj, neĝoŝtormo malofta en la historio atakis Vulkanmaŭdu kaj daŭris unu tutan diurnon, kaj la paŝtejo estis dike kovrita de neĝo. Por gardi la kelkdek milojn da ĵus naskitaj ŝafidoj, la paŝtistoj alportis vestaĵojn al staloj malgraŭ tranĉa frostado. Mongola junulino Tajpingkikige klopodis protekti ĉiamaniere ŝafidojn de frostado. Dank' al sia kuna klopodo, la paŝtistoj venkis la neĝoŝtormon kaj sekurigis la ŝafidojn. La junulino en blua mongola pelta robo kun ruĝeta zono havas aĝon de nur 23 jaroj, tamen antaŭ 7 jaroj ŝi jam komencis labori kiel gvidanto de fekundiga stacio. Kiam ni vizitis ŝin, ŝi diris modeste: "Mi faris nur kion mi devis, mi havas nenion por diri." En la pasinteco, pro kateno de feŭda moro, junulinoj neniel povis fari laboron de fekundigo. Sed nun multaj el la teknikistoj de la pli ol 100 fekundigaj stacioj de la tuta komunumo estas junulinoj.

Ili laboras tre bone.

En la hodiaŭa Vulkanmaŭdu, oni jam adiaŭis por ĉiam la nomadan vivon. Veninte ĉi tien, ni vidis ke multaj novaj paŝtistaj vilaĝoj staras sur la stepo. Ankaŭ la sidejo de la komunuma oficejo estas nove konstruita. Tie estas magazeno, kuracejo, mezlernejo k.a. Respondeculo de la komunumo diris al ni, ke la komunumo jam starigis siajn proprajn industrion kaj agrikulturon, post kiam la paŝtistoj havis fiksajn restadejojn. En la pasinteco, eĉ por aĉeti selon, la paŝtistoj devis iri longan vojon kaj transgrimpigi multajn montojn. Sed nun la komunumo jam havas siajn proprajn industriajn kaj metiajn laborejojn de fero, ledo, lantapiŝoj, lignaĵoj, ladaĵoj, kudrado k.a. kaj la paŝtistoj ne plu bezonas iri longan vojon por aĉeti ion bezonatan. Hodiaŭ, ankaŭ la agrikulturo de la komunumo faris bonan komencon. Konforme al la karakterizaĵoj de alta kaj malvarma montregiono, la paŝtistoj prove kulturis avenon, milion k.s. kaj ricevis sukceson.

Antaŭ la komunumigo, la tieaj paŝtistoj ne kultivis kulturajn legomojn. Nun ili jam komencis kulturajn legomojn. Somere ili povas havigi al si kukumon kaj legumojn; aŭtune ili povas akiri ĉinan brasikon, rafanon kaj terpomon en kvanto sufiĉa por aŭtuno kaj vintro. En la pasinteco multaj paŝtistoj tute ne konis fruktojn, sed nun ili povas ĝui mem kulturitajn sovaĝajn pomojn (*Malus asiatica Nakai*), melonojn, akvomelonojn k.a. Iun serenatan matenon, ni vizitis la brigadon Vulkan-aŭdu. Maljuna paŝtisto Baŭjinhedige diris al ni, ke ekde 1965 la brigado jam rikoltis memkulturitajn fruktojn. Laŭ la produktokvanto de fruktoj de la brigada ĝardeno, ĉiu en la brigado povas akiri ĉiujare 20 kilogramojn da fruktoj. Tagmeze, ni vizitis paŝtiston Lasiga. Kiam ni interparolis, dommas-



Ekkuras traktoroj en paŝta regiono.

trino metis antaŭ ni tableton kaj plene kovris ĝin per butero, laktoteo, bakita rizo kaj fritita pastaĵo. Antaŭ la riĉa tagmanĝo ni iom ĝeniĝis. Konjektinte nian penson, Lasiga diris ripetade, ke tio estas nur ordinara tagmanĝo. Ankaŭ la kamaradoj de tiu loko, kiuj akompanis nin en vizitado, diris, ke tio vere estas ordinara tagmanĝo, ĉar ili ne sciis ke venos al ili gastoj kaj la manĝo ne estis bone pretigita; se ili antaŭscius la venon de gastoj, ili certe regalus la gastojn per “manprena viando” kaj pli multaj

manĝaĵoj el lakto, en kies pretigado la dommas-trino certe montrus sian lertecon.

Parolante pri la hodiaŭa feliĉa vivo, la mongolaj paŝtistoj diris kun granda emociiĝo: “Herbo havas radikon kaj fluo havas fonton; dank’ al Prezidanto Maŭ, la Kompartio kaj la popola komunumo, nia Vulkanmaŭdu havas la hodiaŭan feliĉon.”

Nun la paŝtejo Vulkanmaŭdu grandpaŝe marŝas al pli bela estonteco.

Paŝtistinoj faras sciencan eksperimenton.





Fiŝhavenoj

de Ljuda

DUM printempa fiŝado, ĉie regas atmosfero de riĉa rikolto en la havenoj de Ljuda. La kvanto de kaptitaj fiŝoj en la unua sezono de la kura jaro estas je kvinono pli multa ol tiu de la sama periodo en la pasinta jaro.

Iun februaran tagon, subite ventegis sur la maro. La fiŝkaptista ŝipo 377 de la Ljuda-a Kompanio de Akva Produktaĵo rapide retiris la retojn kaj pretis reiri al la haveno. Ĝuste en tiu tempo la reto de la ŝipo 403 kroĉiĝis al io sur marfundo. La ŝipo



Plenreto da fiŝoj.

377 tuj iris al ĝi por helpo. Fine ili elakvigis la reton kaj revenis al la haveno, plenaj de fiŝoj.

Pro manko de sperto, la fiŝistoj de kelkaj sejnobarkoj en Ĉanghaj-gubernio rikoltis en la unua duono de februaro nur 4,500 kilogramojn da fiŝoj. La fiŝistoj de Daguŝan-komunumo de Gin-gubernio iniciate kune kun ili, studis per la filozofia penso de Prezidanto Maŭ la leĝojn de naĝado de fiŝoj en ofta ventado, alta ondo kaj malalta temperaturo kaj efektivigis scienca fiŝadon, kaj krome sendis al ili lertulojn por konigi al ili sperton en fiŝado. Dank' al tio en la postaj 10 tagoj ili akiris 360,000 kilogramojn da fiŝoj.

Angulo de fiŝhaveno

Freŝaj fiŝoj prilaborataj



En la intensa printempa fiŝado la kadroj de fiŝkaptaj organizoj iris al la fronto de fiŝado, lernis kaj fiŝadis kune kun fiŝistoj. En ĉiu afero ili iris en unua vico. Ĉijaran printempon, komunisto Hju Degin, la estro de fiŝkaptaj brigado de Hajjang-komunumo, partoprenis en fiŝado sur la ŝipo 84. Iun nokton, subite ekventis kaj la maro ondiĝis. La rudro estis implikita de rcto. Por kapti favoran ŝancon de fiŝado, Hju Degin ĵetis sin en la maron, batalis unu horon kaj fine forigis la implikon. La ŝipo 84 akurate enakvigis la retojn kaj kaptis multe

da fiŝoj.

La laborantoj de akvoprodukta serva sekcio sendis "surmaran servon" kaj "surmaran vendejon". La laborantoj akurate aĉetis ĉe fiŝistoj la kaptitajn fiŝojn por ke oni povu akiri plej freŝajn fiŝojn. Samtempe ili liveris al la fiŝŝipoj legomojn, ovojn, viandojn, ladmanĝaĵojn, fruktojn, salon, dizeloleon, retojn, medikamentojn k. a. por kontentigi bezonojn de la fiŝistoj. Ricevinte la prizorgon, la fiŝistoj pli diligente fiŝkaptis por gajni abundan rikolton en la printempo.

Riĉa rikolto de salikokoj





Kvin Kovertoj

KAMARADO Jang Hiangu, ano de la Ĉina Popola Liberiga Armeo (ĈPLA) ricevis leteron de sia frato. En la letero estas la jenaj vortoj: “Fraĉjo, mi komprenis, ke ŝparo de unu groŝo estas ne afero sensignifa, sed grava, kaj tio koncer-



nas konservon de klasa naturo de laboranta popolo.” Kial li skribis pri tio?

Aliĝinte al ĈPLA, Jang Hiangu heredis la revolucian tradicion de la popola armeo. Por disvolvi la spiriton de tiu armeo en penema luktado kontraŭ malfaciloj, ĉiufoje, kiam li skribis leteron al sia hejmo, li uzis koverton mem faritan el ĵurnalo.

Iufoje, li ricevis leteron de sia frato kaj trovis, ke ĝi estas iom pli peza. Li malfermis ĝin kaj vidis 5 aĉetitajn kovertojn. Lia frato demandis, ĉu li domaĝis monon por aĉeti kovertojn.

Jang Hiangu pensis: Evidente mia frato ne komprenis la signifon de ŝparo de unu groŝo. Li tuj skribis leteron al la frato:

“Penema luktado kontraŭ malfaciloj estas trezora revolucia tradicio. En la Longa Marŝo de 25,000 lioj la batalantoj de nia Ruĝa Armeo havis nur pajlajn ŝuojn, manĝis herbojn kaj transgimpis multajn montojn kaj fine rompis la ĉirkaŭekster-



mon de kuomintangaj reakciuloj; en la periodo de la Liberiga Milito, ĈPLA venkis per milio plus fusilo la 8 milionojn da kuomintangaj soldatoj ekipitaj de la usona imperiismo. La hodiaŭa feliĉa vivo de ni laboranta popolo estas akirita per la penema luktado de niaj revoluciaj antaŭuloj. Ni ne devas forgesi tion, sed devas **‘daŭre konservi nian stilon de modesta vivado kaj penema luktado’.**” Skribinte la leteron, li metis en koverton 5 kovertojn el ĵurnalo kaj sendis ilin al sia frato.

Ricevinte la leteron kaj kovertojn, lia frato estis multe kortuŝita. Sekve li skribis la supre menciitan leteron al Jang Hiangu por rakonti la edukon ricevitajn el la 5 kovertoj.



SKRIBIS BRITA LEGANTO D.C.

La Nankina Jangzi-pontego estas vera mirinda konstruaĵo; ne estas iu dubo pri tio, ke Maŭzedongpenso “servu al la popolo” ebligis al oni efektiviĝi kompletigon de la pontego dum mirakle malgranda periodo. Ĝi estas vera statuo pro la fortego de Maŭzedongpenso kaj pro la diligenteo de la vigla ĉina popolo.

La du serioj de la koloritaj kartoj *La Blankhara Knabino* kaj *La Sagaca Kopto de la Tigra Monto* estas treege interesaj. Ili brile kaj senerare montras al la tuta mondo, kiel kuraĝe kaj memofere laboris la kamparanoj kaj aliaj subprematoj dum la malfe-

liĉaj jaroj tuj antaŭ la glora komunistata revolucio.

La libreton *Rakontoj pri Liu Hulan* mi uzos kun miaj gekursanoj. Ĝi ne nur utiliĝos—pro ĝia facila lingvo—por plibonigi la Esperantan spertecon de la studentoj, sed ankaŭ sciigos ilin iom pri la luktoj kaj sindonemo de la ĉina laborista klaso dum la perfida reĝimo de Kuomintangano.

SKRIBIS BRITA LEGANTO D.K.

Mi ricevas *El Popola Ĉinio*-n, kiun vi poŝtendas al mi, kaj ĝi tre plaĉas al mi. Mi mendis pli ol unu kopion de ĉiu, ĉar mi tre ofte ŝatas fordoni unu aŭ pli al novesperantistoj kiel propagandilon por Esperanto kaj Maŭzedongpenso. Mi estas granda admiranto de Maŭ Zedong kaj mi havas super mia lito tri portretojn — unu de Maŭ Zedong, unu de Lenin kaj unu de Ho Chi Minh.

SKRIBIS USONA LEGANTO E.S.

Nuntempe, en la tempo de daŭra antaŭensaltado de la socialisma konstruado en via lando, *El Popola Ĉinio* estas por mi gravega legmaterialo. Senpacience mi atendas novaĵojn pri la vivo, bataloj kaj strebado de via popolo.

Ĉu eble aperos en via gazeto rakonto pri la vizito al Ĉinio de niaj usonaj tablotenisoludantoj, kio okazis antaŭ nelonge?

SKRIBIS FINNA LEGANTO P.T.

Esperanto agas kiel efika internacia komunikilo. Ekz., mi, persono, kiu komprenas nur la nacian lingvon kaj Esperanton, nur per Esperanto mi povas havigi ĝustajn sciojn pri Ĉinio kaj Maŭzedongpenso. Per gazeto *El Popola Ĉinio* mi nun komprenas pli bone aferojn tiel malproksime por ni suomoj.



RIĈA RIKOLTO DE PRINTEMPA TEO

Estas akirita en la provinco Hunan, unu el la ĉefaj produktoj de teo en nia lando.

En tiu provinco estas bonaj kondiĉoj por kreskado de tearboj. En la lastaj jaroj, diverslokaj komunumoj, produktaj brigadoj kaj grupoj en la provinco starigis per siaj propraj fortoj sume pli ol dekdu mil tekulturejojn, tiel ke preskaŭ duobligis la kulturareo kompare kun tiu de 1965. Sole en la gubernio Taŭgiang estas starigitaj 4153 tekulturejoj kun kulturareo de pli ol cent mil muoj. En la lasta jaro, la nove starigitaj tekulturejoj de tiu gubernio jam ricevis rikolton kaj vendis al la ŝtato pli ol 250 tunojn da teo. Ĉi-jare, tiuj nove starigitaj tekulturejoj denove kontribuis per la printempa teo al fortikigo de la kolektiva ekonomio kaj en subteno al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

NOVAJ INSTRUMENTOJ POR FARI RIPARADON KUN KURENTO

La laboristoj de la ripara trupo de la Elektrovizita Oficejo de Kunming, Junnan-provinco, sukcesis fari instrumenton por labori sur alttensia linio kun kurento dum pluvado kaj tiun por libera laboro sur ultra-altensia

linio kun kurento. Dank' al neinterrompo de kurento dum riparado, tiu ripara grupo ebligis pli multan provizon de pli ol 100 miliojn da kilovathoroj en la pasinta jaro.


Junnan estas provinco kun kompare longa pluvsezono. La apliko de tiuj instrumentoj garantias provizadon de elektro al industria kaj agrikultura produkto.

La novaj instrumentoj havas la jenan avantaĝon super la malnova instrumento de malrekta laboro sur linio kun kurento: La malnova pezas 250 kilogramojn. Uzante ĝin oni bezonas 15 laboristojn kaj 3 horojn por ŝanĝi unu porcelanan izolilon, dum uzante la novan, kiu estas malgranda, malpeza kaj facile manipulebla, oni bezonas nur du laboristojn kaj 7 minutojn por plenumi la saman laboron.


ŜLIMSUĈA ŜIPO

Digflegaj laboristoj de la Flava Rivero de la parto de Kihe-gubernio, Ŝandong, konstruis, per siaj propraj fortoj, la unuan ŝlimsuĉan ŝipon uzatan sur la nomita rivero.

La ŝipo havas ŝtalan ŝelon, longecon de 16.8 metroj, larĝecon de 4.4 metroj kaj altecon de 1.3 metroj provizita per dizelmotoro kun 135 ĉevalpovoj. Ĝi povas elsuĉi pli ol 1300 kubmetrojn da ŝlimo ĉiutage aŭ suĉi akvon por irigacii pli ol 280 muojn da kampo. Ĝi povas suĉi ŝlimon por fortigi la dorsan flankon de la digo kaj ankaŭ povas esti uzata por treni boatojn, pliprofundigi riveron kaj ŝtopi breĉon de digo en urĝa momento.



Membroj de Hihu-komunumo en Hangŝou kolektas printempan teon de Longging.



Ŝanĝiĝas la Mondo

JAŬ ŜIĈANG*

LA hodiaŭa mondo estas en granda revolucia ŝanĝiĝo. Daŭre disvolviĝas nova alta tajdo en la batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ĝuste kiel la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: “La danĝero de nova mondmilito ankoraŭ ekzistas, kaj la popoloj de ĉiuj landoj nepre devas sin prepari. Sed, nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio.” Nun la subpremataj kaj ekspluatataj popoloj en la mondo pli kaj pli konsciiĝas kaj kuraĝas leviĝi kontraŭ la imperiistoj kaj reakciuloj, kiuj ilin agresas, pli kaj pli multaj homoj komprenas, ke la sola elirejo estas preni pafilojn por konduki la revolucionan batalon; malgrandaj kaj malfortaj landoj antaŭe malestimataj nun povas venki la grandajn kaj fortajn. Unuvorte, nun la tuta mondo plenas je animskua batalo: en Azio blovas furioza uragano, la tuta Afriko bolas, brulegas Latinameriko, skuiĝas Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio. Ĉio en la mondo ŝanĝiĝas malfavore al la kontraŭrevoluciuloj kaj favore al la revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj!

Ŝanĝiĝo estas universala, senescepta objektiva leĝo sendependa de homa volo. Prezidanto Maŭ diris: “Kontraŭdiro ekzistas en la procezo de disvolviĝo de ĉiuj objektoj kaj trairas la procezon de disvolviĝo de ĉiu objekto de la komenco ĝis la fino.” Kie estas kontraŭdiro, tie estas batalo, ĉio en la mondo moviĝas, ŝanĝiĝas kaj evoluas en batalo. Izola, senmova kaj senŝanĝa objekto tute ne ekzistas.

Ŝanĝiĝo estas procezo de nove naskita afero en senĉesa venkado super kaduka afero. Interne

de ĉiu afero sin trovas kontraŭdiro kaj batalo inter novo kaj malnovo. La batalo inter kontraŭaĵoj kaj turniĝo de kontraŭaĵo estas ŝanĝiĝo. Alivorte, la novo iom post iom kreskas, fortiĝas kaj iras al venko, dum la malnovo tagon post tago velkas, reakciiĝas kaj iras al pere. En nia lando, sekve de la venko de la revolucio, la reakcia klaso ŝanĝiĝis de regantoj al regatoj, dum la popolo turniĝis de regatoj en regantojn. Sekve, la socio de Ĉinio ŝanĝiĝis kvalite, de la duonkolonia kaj duonfeŭda malnova Ĉinio en la socialisman novan Ĉinion. La nove naskita venkas la dekadencan — tio estas nerezistebla leĝo de evoluo. La revolucio de nia lando pruvis ĝin kaj la nancisava batalo de la tri popoloj de Hindoĉinio kontraŭ la usona imperiismo kaj la revolucia batalo de la popoloj tra la tuta mondo certe plue ĝin pruvos.

Ŝanĝiĝo havas certan procezon, nome tiun de kvanta ŝanĝiĝo al kvalita ŝanĝiĝo, de iom-post-ioma ŝanĝiĝo al subita ŝanĝiĝo. Se ne estas ŝanĝiĝo en kvanto, ankaŭ ne povas esti ŝanĝiĝo en kvalito; se ne estas iom-post-ioma ŝanĝiĝo, ankaŭ ne povas esti subita ŝanĝiĝo. Estas neeble krei puton per unu forŝovelo de tero; kaj same neblas mortigi tigron per sola pugnobato. La popoloj de la tri landoj de Hindoĉinio estas forglutanta la usonan agresan armeon buŝon post buŝo. Tio ĉi estas procedo de ŝanĝiĝo en kvanto kaj preparado por ŝanĝiĝo en kvalito. Certe venos la tago, kiam la usonaj agresantoj estos ĝisfunde venkitaj de la popoloj de la tri landoj de Hindoĉinio.

Ŝanĝiĝo ne povas ĉiam iri glate. Kelkfoje en iu parto malnova reakcia afero povas subpremi



Jaŭ Ŝiĉang (la dua de dekstre) esploras pri la kreska leĝo de arakido kune kun membroj de la scienca eksperimenta grupo.

novan progresan aferon. Sed en konsidero de la direkto de la historia disvolviĝo, tio estas nur fenomeno provizora. Revoluciuloj devas stari alte kaj vidi malproksime, vidi la esencon tra la fenomenoj, ne esti teruritaj de la feroca aspekto de la reakciuloj, ne deprimiĝi pro portempa malsukceso, sed persisti en batalo kaj tio signifas venkon!

Rilate al ŝanĝiĝo, malsamaj klasoj havas malsamajn opiniojn, malsamajn sintenojn kaj malsamajn celojn. Ĉiuj reakciuloj ekstreme timas, malbenas kaj ĉiamaniere malhelpas revolucionan ŝanĝon. Per ĉiaj malnoblaj rimedoj ili trompas, timigas kaj subpremas diverslandajn popolojn kun la celo bari la antaŭenruliĝadon de la historia rado, vane provante por ĉiam konservi sian reakcian regadon. Ni revolucionaj popoloj rigardas la re-

volucian ŝanĝon kiel neeviteblajn de la historio, varme prikantans kaj aktive propagandas ĝin kaj energie akcelas la turniĝon de la afero, por atingi la celon de la revolucio.

La mondo ŝanĝiĝas. Tio ĉi estas nerezistebla leĝo de historio. Sed la ŝanĝiĝo de ĉia ajn afero estas efektivigita tra batalado de ĝiaj propraj kontraŭaĵoj. Sen batalo ne eblas ŝanĝo. Tiel same estas revolucio. Polvo ne foriras sen balaado kaj malamiko ne falas sen bato. Revolucio povas venki nur per batalado.

**La verkinto estas sekretario de la partia filio de Tuangie-brigado, Penglaj-gubernio, Ŝandong-provinco.*

BOTAŬ:

Financa Krizo

Uragane Ŝancelas la Pozicion de la Usona Dolaro

EN majo de 1971, en la kapitalisma mondo eksplodis senprecedence granda financa krizo, kiu donis fortan baton al la usona dolaro. La usona monopola burĝaro tre maltrankviliĝis pro tio.

En la tuta kapitalisma mondo pli kaj pli ŝanceliĝis la konfido al la usona dolaro. Multaj ŝtataj bankoj de la okcidenteŭropaj landoj rifuzis pliigi sian rezervon de la usona dolaro, sed postulis ŝanĝin en oron. La usona financa ministerio informis je la 12-a de majo, ke Francio jam ŝanĝis ĉe Usono pli ol 280,000,000 usonajn dolarojn en oron. Samtempe kun tio la Centra Banko de Belgio anoncis, ke ĝi jam ŝanĝis cent milionojn da usonaj dolaroj en oron. En la 13-a de majo la novaĵ-servo de *New York Times* informis el Bruselo, ke kelkaj okcidenteŭropaj landoj “jam komencis novan ciklon de ŝanĝo de la usona dolaro. En la unua duono de majo, Nederlando, Belgio kaj Francio jam ŝanĝis siajn superflujajn usonajn dolarojn en oron kun valoro de 422,000,000 dolaroj.”

La fakto, ke okcidenteŭropaj landoj ŝanĝis usonajn dolarojn en oron el la ŝtata kaso de Usono, akre montris la abruptan falon de la pozicio de la usona dolaro. Ĉar la totala sumo de usonaj dolaroj en la manoj de la okcidenteŭropaj landoj kaj aliaj kapitalismaj landoj estas pluroble pli granda ol tiu de la ora rezervo de Usono, kaj tiu ĉi tre timas la ŝanĝon de iliaj usonaj dolaroj en oron kaj ĉiamaniere premadas ilin, por ke ili ne postulu tion.

Sed, spite al la ĉantaĝo de Usono, Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj denove ŝanĝis usonajn dolarojn en oron. Krom tio, en sia parolo al la Franca Nacia Asembleo la ministro de la financaj

kaj ekonomiaj aferoj de Francio Valery Giscard d'Estaing ankoraŭfoje emfazis, ke ses landoj de la “komuna merkato” devas fari konkretajn aranĝojn por haltigi enfluan de dolaroj en okcidentan Eŭropon. Li ankaŭ esprimis, ke en sia batalo kontraŭ inflacio Usono ne devas postuli de okcidenteŭropaj landoj pagi la koston. En sia ĉefartikolo de la 10-a de majo la franca ĵurnalo *La Nation* emfazis: “Eŭropo portas nenian respondecon por la nuna mona krizo, kiun kaŭzis eksporto de la inflacio de Usono kaj nebridebla spekulacio de usonaj dolaroj en Eŭropo, tial estas nenia kaŭzo ke Eŭropo ankoraŭfoje pagu anstataŭ Usono por ĝia politiko.”

Tuj post kiam vastiĝis la informo, ke Francio, Belgio kaj aliaj landoj ŝanĝis siajn dolarojn en oron, rapide leviĝis la prezo sur la okcidentaj merkatoj de oro. En la 13-a de majo, sur la londona merkato la prezo de oro rapidege leviĝis de 40.15 dolaroj por I unco en la 5-a ĝis 41.3 dolaroj kaj starigis la rekordon de post aŭgusto de 1969. En la sama tago ankoraŭ sur la frankfurta merkato la prezo de oro leviĝis ĝis 41.18 dolaroj.

Por redukti la influon de ŝanĝo de dolaroj en oron fare de Francio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj, la usonaj aŭtoritatoj speciale komisiis proparolanton de la financa ministerio fari deklaron, en kiu la lasta emfazis, ke tio havas “nenian rilaton” kun la nuna mona krizo kaj ke Usono “sentas nenian premon”. Sed, komentarioj de kelkaj usonaj novaĵ-agentoj malkaŝis la mallertan artifikon de Vaŝingtono. *Associated Press* diris: “La paŝo de Belgio, alprenita tuj post la apero de la krizo de la usona dolaro en la lasta semajno, eble embarasus la usonan registaron. Se ŝtataj bankoj de aliaj eŭropaj landoj unuanime sekvus la ekzemplon de Belgio kaj ŝan-

ĝus siajn dolarojn en oron, tio povus detrui la monan sistemon de la mondo.” La ora rezervo de Usono sufiĉas nur “por repagi malpli ol trionon de la usonaj dolaroj tenataj de fremdlandaj centraj bankoj”.

Kun la abrupta falo de la pozicio de la usona dolaro, la simbolo de la usona ekonomia forto, la usona reganta kliko jam ne povas kaŝi sian streĉitecon kaj malgajan humoron. Iu okcidenta novaĝ-agentejo montris “la timegon de la usona Kongreso, pri la dolara krizo en Eŭropo”. Usona senatano Barry M. Goldwater ĉagrene konfesis je la 11-a de majo, ke la “fiereco” de Usono trafis “fortan baton”. Li diris: “Nia prestiĝo kaj la respekto, kiun aliaj landoj de la mondo havas por ni, certe ne altiĝis, kiam la usona dolaro almozis sur la

eŭropa kontinento kaj fremdlandaj registaroj aplikis ekstremajn rimedojn por kontraŭi la influon de la usona inflacio.” Kaj ankaŭ alia usona senatano Javits kun timo diris je la 12-a de majo, ke “Usono devas rigardi la nunan krizon kiel teruran averton”. *Newsweek*, organo de la usona monopola burĝaro veis: “Maltrankvileco profundiĝis. . . La usona dolaro, antaŭe enviinda posedaĵo, fariĝis pli kaj pli simila al nefidinda ŝuldatesto.” “Radikala ŝanĝo ŝajne estas certa — kalkuleblaj estas la tagoj, en kiuj Usono daŭre restos natura ĉefo en la monda financo.”

La kapitalisma mondo ŝanceliĝas en la ŝtormo kaj la pozicio de la usona dolaro troviĝas en pli danĝera situacio. Tio estas neevitebla rezulto de la historia disvolviĝo.



Krizo de la Usona Dolaro

EN la kapitalisma internacia financa merkato, la krediteco de la usona dolaro falis, oni multe vendis usonajn dolarojn por ricevi oron aŭ alilandajn valutojn, tiel ke la prezo de oro leviĝis kaj la kurzo de la usona dolaro falis. Tiamaniere fariĝis “krizo de la usona dolaro”. Ĉar la usona dolaro estas ĉefa valuto en la kapitalisma mondo,

sekve ĝia krizo neeviteble influas la financan kaj valutan merkaton de la tuta kapitalisma mondo.

La usonaj dolaroj prenis oran rezervon kiel garantion. Post la Dua Mondmilito, sub la apogo de sia ekonomia forto ŝveliĝinta en la milito kaj per la organizo de Internacia Mona Fonduso starigita sub la planado de Usono, la usona imperiismo bazis la kurzojn de alilandaj valutoj sur la usona dolaro, kaj samtempe, laŭ la difino en 1934, estis permesite al alilandaj centraj bankoj aĉeti de la usona registaro oron je la prezo de 1 unco da oro kontraŭ 35 dolaroj. Tiamaniere, metante la usonan dolaron sur pozicion egalan al tiu de oro, Usono starigis kapitalisman internacian mon-sistemon kun la usona dolaro kiel la centro.

En tiu tempo Usono ankoraŭ havis iom da kapitalo por tion fari. Pro riĉiĝo en la milito, en 1949 Usono havis oran rezervon de 24.6 miliardoj da dolaroj, kiu okupis preskaŭ 70% de la tuta kvanto de oro posedata de la kapitalisma mondo. Tial, la usona dolaro lu-

dis la rolon de oro kiel “rezerva mono”.

Sed kun la disvolviĝo la ekonomia krizo de kapitalismo, rapide malgrandiĝis la politikaj kaj ekonomiaj fortoj de Usono. Precipe pro tio ke la usona imperiismo senĉese faris agresajn militojn, freneze faris militan kaj ekonomian ekspansion, tenas eksterlande grandajn nombrojn da garnizonaj trupoj, usonaj dolaroj senĉese fluis eksterlanden. La fremdaj landoj, kiuj akiris tiujn dolarojn, ŝanĝis ilin kontraŭ oro de Usono, tial senĉese malmultiĝas la ora rezervo de Usono, kaj sekve falas la krediteco de la usona dolaro. En 1958 kaj 1960, en la kapitalisma mondo okazis tajdo de grandskala forvendo de usonaj dolaroj kaj konkura aĉeto de oro.

Depost kiam la usona imperiismo pligrandiĝis la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, pli oftigis la krizo de la usona dolaro. Gigantaj militaj elspezoj rapidigis la elfluon de usonaj dolaroj eksterlanden, kaj samtempe, por kovri sian deficon en spezoj, la usona registaro


senbride emisiis bankbiletojn, tiel ke pli serioziĝis la inflacio kaj kariĝis la varoj en Usono. Pro tio multe malfortiĝis la konkurenca povo de Usono en eksporto, pli kaj pli malboniĝis la stato de eksterlanda negoco kaj ofte aperis malfavora saldo en internaciaj spezoj. Rezulte de tio, pli kaj pli multiĝis la usonaj dolaroj en aliaj landoj kaj pli kaj pli malmultiĝis la ora rezervo en Usono. En la fino de 1967, aliaj landoj havis en siaj manoj pli ol 33 miliardojn da usonaj dolaroj ŝanĝeblaj en oron, sed Usono havis oran rezervon nur de 12 miliardoj da dolaroj, kio povis kovri nur trionon de ĝia ŝuldo. Tiuj, kiuj tenis usonajn dolarojn en la manoj, pli maltrankviliĝis.

En tia stato, eksplodis en marto de 1968 krizo de la usona dolaro kun skalo senprecedenca post la Dua Mondmilito. La tuta kapitalisma mondo dronis en furioza tajdo de vendo de usonaj dolaroj kaj konkura aĉeto de oro, kio devigis Usonon rezigni la tenadon de la oficiala kurzo de 1 unco da oro kontraŭ 35 usonaj dolaroj en londona merkato, kaj leviĝis la prezo de 1 unco da oro ĝis pli ol 40 usonaj dolaroj, kio fakte estis devaluto de la usona dolaro.

En marto de 1968, kiam Usono deklaris ke ĝi rezignas tenon de la oficiala prezo de oro en libera merkato, ĝi faris premon al aliaj landoj, ke ili ne ŝanĝu aŭ malmulte

ŝanĝu usonajn dolarojn kontraŭ oro de ĝi. Sed daŭre malfavoriĝis la saldo de la internaciaj spezoj de Usono. Je la fino de 1970, Usono havis mallongtempajn ŝuldojn de 49 miliardoj da dolaroj, sed el ĝia ora rezervo restis nur 11 miliardoj da dolaroj. Sekve, tiuj, kiuj havas usonajn dolarojn, timas ilian devalutiĝon kaj konkure ŝanĝas ilin kontraŭ alilandaj valutoj pli stabilaj. Kaj en la fino eksplodis la ĉijara krizo de la usona dolaro, en kiu oni vendis usonajn dolarojn kaj aĉetis markojn de la Okcidenta Germanio, svisajn frankojn kaj alilandajn valutojn. La krizo de la usona dolaro profunde spegulas la dekadencan de la usona imperismo.

Ora Rezervo de Usono



NOVAJ VENKOJ DE LA ARMEO KAJ POPOLO DE VJETNAMIO

En la lasta tagdeko de majo, la armeo kaj popolo en la regiono Tay Nguyen de suda Vjetnamio faris sinsekvajn atakojn al la uson-pupa armeo kaj ekstermis grandan kvanton da vivaj fortoj de la malamiko. De la nokto de la 20-a ĝis la 26-a de majo, la armeo kaj popolo en tiu regiono ekstermis 1 roton kaj 5 plotojn de la pupa armeo, entute pli ol 660 malamikojn. La 28-an de majo, la Liberiga Armeo furioze ĉirkaŭatakis la 1-an kaj 2-an batalionojn de la 45-a regimento de la pupa armeo sur la altejo 364 proksime de Phu Nhon de la provinco Dac Lac kaj ekstermis 300 malamikojn.

La Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj en norda parto de la provinco Gia Dinh surprizatakis nokte de la 24-a

kaj frumatene de la 25-a de majo la starejon de la 2-a bataliono de la 11-a kirasita regimento de la usona armeo kaj ekstermis 130 usonajn agresantojn.

LA ARMEO KAJ POPOLO DE LAOSO EKSTERMIS PLI OL 2,000 MALAMIKOJN

De la 27-a de aprilo ĝis la 24-a de majo, la patriotaj armeo kaj popolo de Xieng Khoang de Laoso faris furiozan atakon al la malamikoj en Long Cheng, Ban Na k.a. kaj ekstermis ĉirkaŭ 1,200 malamikojn. La armeo kaj popolo de la provinco Savanaket atakis la apogpunktojn en Pha Lan, Dong Hen k.a. kaj ekstermis pli ol 900 malamikojn.

LA NACILIBERIGAJ POPOLAJ ARMITAJ FORTOJ DE KAMBOĜO EKSTERMIS 1,500 MALAMIKOJN

La 6-an de majo, la Naciliberigaj Popolaj Armitaj Fortoj de Kamboĝo faris sinsekvajn furiozajn atakojn al la malamikoj en Snoul-areo en la provinco Kratie kaj vundis kaj mortigis entute 1,500 malamikojn, el kiuj 300 estis kaptitaj.

Artilerianoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio eniras en sian batalpozicion.



**LA ARMEO KAJ POPOLO DE LA PROVINCO
NGHE AN EN NORDA VJETNAMIO FALIGIS
UNU SENPILOTAN AVIADILON DE USONO**

La 5-an de junio, unu senpilota bandita aviadilo de Usono invadis en la provincon Nghe An de norda Vjetnamio kaj estis faligita de la armeo kaj popolo de tiu provinco ĉiam en atenta gardado.

*Batalanto Boun Lh de la 7-a taĉ-
mento de la Kamboĝaj Naciliberigaj
Armitaj Fortoj en Kompong-Cham,
kiu partoprenis jam 13 batalojn.*



*Pupaj soldatoj de Sajgono en Ban Dong kapitu-
lacas antaŭ la Laosa Popola Liberiga Armeo.*



Sur la Kovrilo:

Kamarado Ceausescu kaj lia edzino kaj aliaj rumanaj kamaradoj manŝvinge salutas al la revoluciaj popolamasoj, en akompano de kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj.

Sur la Dorskovrilo:

Vivu la batala amikeco inter la ĉina kaj rumana popoloj!

Korespondi Deziras

*Luan Janpi, Logja No. 4, No. 155/5, Rruga Naun Caushi, Durres, Albanio, kun geesp-istoj eŭropaj kaj aziaj.

*Kun junaj geesp-istoj en Azio kaj Afriko. Ozaki Kentaro, 249-Zuŝi ŝi, Ŝinjuku 4-1742, Kanagaŭa Ken, Japanio.

*Karl Siegmund, Oberhausen, Osterfeld, Waisenhausstrasse 41, Germana Federacia Respubliko, kun ĉl. pri ĉt.

*54-j. sveda laboristo dez. kor. kun esp-istinoj. S-ro Runo Mur, Poste Restante, Göteborg 5 (Södra vägen), Svedio.

*Stefan Treneansky (20-j.), Gundnlicova 5, Bratislava, Ĉeĥoslovakio, kun knabinoj kaj knaboj.

*Alberto Corrado k Maria M. Stagi (E-geedzoj), via Pisa 59, 54039 Ronchi Di Massa, Italio, dez. kor. kun Afriko kaj Azio pri problemoj de batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.

*29-j. bibliotekisto dez. kor. kun bibliotekistoj en tutmondo. S-ro Paul J. Lareau, 1032 Orchard Street, Toledo, Ohio 43609, U.S.A.

*Harald Brühl, 435 Recklinghausen Warthestr. 9, Germana Federacia Respubliko, serĉas kor. amikojn en tutmondo.

EL POPOLA ĈINIO 人民中国新闻

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8 (157) 1971

Ĉefa Enhavo

La Partia kaj Registara Delegacio de Rumanio Estrata de Kamarado Nicolae Ceausescu Vizitis Ĉinion

Ĉiam Flirtos la Ruĝa Flago de Ginggaŝ-montaro

Armitaj Bataloj de Nia Montvilaĝo

Tunelaj Bataloj de Ĵanĝuang

Marŝas la Popolo de Ŝanghang

Heroaj Inĝenieraj Trupoj

Semo de Amikeco

He Dezaŭ — Soldato de la Ruĝa Armeo

Cervopaŝta Knabino

Vizito al Emerita Laboristo Liu Zajhiang

Sinsekvaj Riĉaj Rikoltoj de Kotonon en Nia Lando

Dokumenta Filmo "La Irigacia Kanalo Ruĝa Flago"

La Hodiaŭa Paŝtejo de Vulkanmaŭdu

Fiŝhavenoj de Ljuda

Ŝanĝiĝas la Mondo

Financa Krizo Uragane Ŝancelas la Pozicion de la Usona Dolaro

Disvolvu Sportojn por Plifortigi


la Korpon de la Popolo



Lernantoj de la Elementa Lernejo de Guangling-strato de Ŝanhajo ludas tablotenison.



Persistante en la principo "unue amikeco, due konkurso" en internaciaj sportaj aktiva-
doj, niaj sportistoj interŝanĝas sperton kaj lernas reciproke kun diverslandaj sportistoj.
La foto montras, ke volanistinoj de Ĉinio kaj Koreio salutas la rigardantojn post pre-
zenta ludo.





Pekinaj mezlernejoj fa-
ras gimnastikan ekzercon.



Membroj de Bejling-komu-
numo de Giangsu-provinco
sin ekzercas pri ŝnurgrim-
pado utiligante naturan
kondiĉon.

Ĉinaj tablotenisistinoj serio-
ze resumas sperton.





Skiistoj de Gilin-provinco prezentas skian arton al kamparanoj.

Korbopilkaĵaj trupoj de Pekino kaj Ŝanhajo en amika maĉo

Ĉina atleto Ju Vejli novigis nian landan rekordon de vira 200-metra kuro per sia atingo de 20.8 sekundoj.

